


VALO

SEPDEK
JAROJ

SUB LA

VERDA

STELO



1980 *
10 FF

Cercle espérantiste
de l'Agenais *

K O R E K T O J

al "Sepdek Jaroj sub la Verda Stelo"

- Pago 3 linio -4 pri → pro
P.7 kaj 96 Sébert devas esti Sebert
P.9, 1.23 sindikatoj, anarkista aŭ
socialista. Mankas vortoj : "sindikatoj,
kooperativoj kaj ekstrem-maldekstraj
organizoj, anarkista aŭ socialista."
P.19 kaj 94 Guadet Lucien devas esti
Julien.
P.34 kaj 90 magjaro d.e. madjaro(PIV).
(neologismo trovebla en PIV)
P.67 : M.C.Butler neniam estis prezid-
anto de la Akademio !
P.70 linio 16 Chiare → Chiara.

VALO

Sepdek jaroj
sub
la verda stelo

Al la kara memoro
de S-ro Ernest LAUZE,
mia instruinto pri esperanto

Cercle espérantiste
de l'Agenais
F 47340 Laroque Timbaut

Pri kelkaj precizaj informoj mi dankas
al jenaj samideanoj :

S-ro J. AMOUROUX en Perpinjano

S-ro Roger BERNARD en Parizo

K-do N. BARTHELMESS en Parizo.

Mi dankas ankaŭ al gekamaradoj

KRIBO en Laroque-Timbaut

Ĵaklino LEPEIX en Strasburgo

kaj PONTNAU en Tuluzo,

kiuj bonvolis tralegi mian manuskripton,
kaj kuraĝigis min por publikigo.

Same al k-dino Catina DAZZINI,

kiu plie tre zorge ĝin lingve kontrolis.

La neologismoj estas klarigitaj en fina glosaro.
Tiuĵ, kiuj ne troviĝas en PIV, estas signitaj en
la teksto per kruceto x.

Tiu ĉi broŝuro aperas en la kadro de la
broŝurservo de Sennacieca Asocio Tutmonda.



Averto.

Kara leganto, se vi scivolas kompletajn precizajn informojn pri la historio de la esperantista movado, ne legu pli antaŭen: kion vi serĉus, tion vi ne trovus ĉi tie. Feliĉe, en nia literaturo ne mankas dokumentoj kaj seriozaj libroj, kiuj liveros al vi kvanton da tiaj informoj. Ĉi tiu broŝuro havas tute alian karakteron kaj celas malpli alten. Sur ĝiaj paĝoj, foje-foje, pasas la ombro de la flugiloj de historio, sed ĝia konsisto situas banale sur tera nivelo: epizodoj el la longa sperto de ordinara esperantisto. En ĝi la movado, neŭtrala kaj laborista, estas vidata per la okuloj de unuopulo, simpla soldato en la armeo de la pacaj batalantoj, veterano, kiu memoras pri siaj kampanjoj. Se ĝi havus ian meriton, tiu ĉi kuŝus nur en la aŭtenteco de la anekdotoj kaj en la sincereco de la rakonto. Se tamen vi kuraĝos dediĉi iom el via tempo al la legado de tiuj babilaĉoj, bonvolu indulgi kaj pardoni al kaduka maljunulo.

En tiuj paĝoj svarmas nomoj de esperantistoj, aŭ pli-malpli eminentaj kaj famaj, aŭ tute nekonataj. Male al mia opinio pri la esperantigo de propraj nomoj*, mi skribis ilin en la nacia ortografio, laŭ la ekzemplo de K-do Borsboom en lia "Vivo de Lanti" kaj pri la sama motivo. Kelkaj esceptoj: Ĉe (Andreo Cze), Glodino (Simone Glodeau), Kribo (Christian Baudé), Rofo (François Richard), Bubo (François Paquier).

* Sennacieca Revuo 1952.

Tabelo de enhavo.

| | |
|---|----|
| I - <u>La Franca Periodo.</u> | 7 |
| 1. La movado en Francio antaŭ 1914. | 7 |
| 2. Unuaj paŝoj. L'Espero Alesa. | 8 |
| 3. Regionaj renkontoj. | 10 |
| 4. Michelin-konkurso. | 12 |
| II - <u>La Esperoj Frakasitaj.</u> | 13 |
| 1. 1914. La Deko Kongreso. La milito. | 13 |
| 2. Esperantistoj en la milita tempo. Morto de Zamenhof. | 13 |
| 3. La morto frapas en la grupo "L'Espero Alesa". | 14 |
| III - <u>Timide kaj Mallerte.</u> | 16 |
| 1. Propagando inter kunlernantoj. | 16 |
| 2. Flirto kun ido. | 17 |
| 3. Versajlo, Parizo. Unuaj kontaktoj kun tieaj samideanoj. | 17 |
| 4. Unua renkonto kun laboristaj esperantistoj. | 18 |
| 5. La neŭtrala Pariza grupo en Sorbono. | 19 |
| 6. La Verdkata klubo. | 20 |
| 7. Saint-Maixent. Nova propagandprovo, nova fiasko. | 21 |
| IV - <u>Intermezo en Germanio.</u> | 23 |
| 1. Franca oficiro kaj germanaj esperantistoj. "Ĉu ci parolas hinde?" | 23 |
| 2. Krizo inter nacioj, konkordo en Esperantio. | 25 |
| 3. Sur Rejno, kun karavano al Nurenbergo. | 26 |
| 4. En Wiesbaden kaj tra Rejnlando. | 28 |
| 5. Franca Kongreso en Strasburgo. | 29 |
| V - <u>La Folaj Jaroj.</u> | 31 |
| 1. En la mondon venis novaj sentoj. Ŝprucas novaj formoj. | 31 |
| 2. La Verda Kato. | 32 |
| 3. Mi ilustras verkojn de R. Schwartz. | 34 |

| | |
|---|----|
| | 5 |
| VI - <u>Hezita Valso. Ĉu neŭtrala, ĉu "ruĝa" ?</u> | 36 |
| 1. Unuaj informoj pri laborista movado. | 36 |
| 2. Burĝoj kaj neŭtraluloj en Parizo. | 36 |
| 3. Federacia komitatano. Konflikto en UEA. | 39 |
| 4. Aliĝo al FEO. Daŭraj kontaktoj kun la neŭtrala movado. Pastro Ĉe en Sorbono. | 41 |
| 5. Universala Kongreso de UEA, Parizo 1932. | 44 |
| 6. Mi aliĝas al SAT. Internaj malpacoj. SAT-kongreso 1935. | 45 |
| VII - <u>La Popolfronto.</u> | 47 |
| 1. Skizo pri naskiĝo de popolfronto. Esperantista partopreno. | 47 |
| 2. Reuniĝo de la poresperanta laborista movado en Francio. | 48 |
| 3. Korespondado kun Sovetianoj. Rea malpaciĝo. Naskiĝo de SAT-Amikaro. | 49 |
| 4. La Pirato. La Bolanta Kaldrono. Originaleco de R. Schwartz. | 50 |
| 5. La Vegetalista Restoracio. Foriro de Lanti. | 52 |
| 6. Lasta renkonto kun amiko Echard. | 53 |
| VIII - <u>Tra Provincoj.</u> | 54 |
| 1. Klermonto. Nimo. | 54 |
| 2. En Bearno. Morto de Lanti. | 55 |
| 3. En Aleso, "mondanigita komunumo". | 58 |
| 4. Pariza intermezo. La Tri Koboldoj. Huguette kaj Natalie. | 60 |
| 5. Denove en Paŭo. Vojaĝoj en Italio. | 62 |
| 6. UEA-kongreso en Marsejlo 1957. | 66 |
| 7. Literatura Komitato. | 67 |
| 8. SAT-Kongreso en Narbono 1964. | 69 |
| 9. En Torino. | 69 |
| IX - <u>Emerito.</u> | 72 |
| 1. Taskoj por pensiulo. | 72 |
| 2. Tradukoj kaj originaloj. | 73 |
| 3. Vojaĝoj. | 75 |
| 4. En Nimo kaj ĉirkaŭa regiono. | 76 |
| 5. SAT-amikaro en Avinjono. | 80 |

| | |
|--|----|
| X - <u>Per Esperanto al Amikeco.</u> | 83 |
| Esperanto, funkcianta kiel helplingvo, ĝermigas simpatian, kaj tekstas amikajn rilatojn inter homoj, kiuj sen ĝi neniam estus renkontintaj unuj la aliajn. | |
| XI - <u>Kaj nun ?</u> | 86 |
| 1. Bilanco de sep jardekoj. | 86 |
| Ne profeto en propra domo. | |
| 2. Testamento : konsilo al gejunuloj. | 88 |
| <u>Glosaro.</u> | 89 |
| <u>Indekso de personaj nomoj.</u> | 93 |

I. La Franca Periodo.

1. Mi estis dekjara, en 1910, kiam mi unuafoje aŭdis pri esperanto. Mia juna imago-povo ricevis fortan impreson. De tiam mi revadis pri la lingvo internacia, kaj mi promesis al mi : iam, nepre mi ĝin lernos.

En tiu tempo, post la pola-rusa kaj la germana, floris la t.n. franca periodo de la esperantista movado. Per impulso de kelkaj scienculoj : D-ro Javal, Carlo Bourlet, Generalo Sébert, ing. Rollet-de-l'Isle ; de universitataj profesoroj : Cart, Aymonnier, Grosjean-Maupin, rektoro Boirac ; de lingvistoj : de Beaufront (Bofronto, PIV), Couturat, kaj la franc-lingva sviso de Saussure ; de pioniroj kiel Archdeacon, la movado fulme disvastiĝis en Francio. En multaj urboj fondiĝis grupoj multmembraj kaj viglaj.

Ofte, verdire, oni pli bankedis kaj dancis ol praktikis la lingvon. Estis malpli da veraj esperantistoj ol da afablaj esperantanoj, kiuj bombaste laŭdadis la meritojn de la lingvo internacia... plejofte en la nacia (kvankam la verbo "krokodili" ankoraŭ ne estis elpensita).

Pri ĉio ĉi mi ne sciis, kiam en 1911, en Arlezo, pasante sur la "Lices"-promenejo, mi hazarde ekvidis, ĉe unuaetaĝa fenestro super kafejo, ŝildon kun verda stelo kaj surskribo : "Grupo esperantista". Do, tio ja ekzistas kaj funkcias. Tiu kons-tato firmigis mian intencon. Mi pli kaj pli deziris renkonti esperantistojn kaj ekkoni ilian aferon.

2. Aleso. 1912.

Al la adreso de miaj gepatroj venis presita karto : "Vi estas kore invitataj al informa kunveno, kiu okazos venontan dimanĉon je la tria posttagmeze en la granda salono de la urbodomo. Temo : la internacia lingvo Esperanto." Tuja decido : ni trio pe tien iros.

Je la fiksita horo, la ĉambrego estas plena de sidantaj homoj. Sur podio, S-ro Dauphin*, licea instruisto en Nimo, malfermas la kunvenon per brila prelego. Poste S-ro Carli, nimano eks-alesano, de itala deveno, recitas en esperanto la amuzan rakonton pri "La Muŝoj", kun akompano de tiel elvokivaj gestoj kaj mienoj, ke ĝi estas de ĉiuj senpere komprenata. Fine, ĉe nigra tabulo, S-ro Lauze, naskita en Anduzo, kiu lernis esperanton en Liono, prezentas la strukturon de la lingvo kaj montras per kelkaj ekzemploj la simplecon de ĝia gramatiko kaj la facilecon de la vortfarado. Eksplozas varma aplaŭdado. Kvindeko da personoj entuziasme enskribiĝas por sekvi la kurson gvidotan de S-ro Lauze. Inter la unuaj, miaj gepatroj kaj mi. La kurso okazos en tiu sama loko, po du horoj ĉiusemajne. Ĉe la unua rendevuo ni retroviĝis kvardekope. Sed baldaŭ la lokalo fariĝis ridinde vasta por la iom post iom ŝrumpanta lernantaro. Ni migris en klasĉambron de unuagrada lernejo.

Tie mi sola sidis komforte : ĉar la longaj gamboj kaj iafoje la dikaj ventroj de la plenkreskuloj malfacile sin kunpremis inter la skribotabloj kaj la benkoj, nedisigeblaj, taŭgaj laŭ dimensioj por knabetoj. Tiu maloportunaĵo ne senkuragiĝis la kernon da

* Ne temas pri tiu S-ro Dauphin, kiu dum multaj jaroj sindone kaj kompetente mastrumadis la Centran Esperantistan Librejon en Parizo.

fidelaj persistemuloj. Fine de la lernojaro restis ankoraŭ dekduo.

Pluraj ne atingis altan gradon en la sci-povo de la lingvo, kaj ne akiris fluan parolkapablon. Inter ili mia patrino; tamen ŝi lege kaj aŭde sufiĉe bone komprenis, kaj, se necese, povis iomete paroli - kiel nun mia edzino, se ŝi troviĝas fronte al alilandaj esperantistoj. Fakte, nur mia patro kaj mi, dank'al ofta kunekzercado, fariĝis veraj praktikantoj*. Plie estis, krom la instruanto, du jam kapablaj esperantistoj lernintaj en aliaj urboj. Ni fondis grupon, "l'Espero Alesa", kiu aliĝis al SFPE**.

Mi rimarkas, ke en tiu grupo troviĝis eĉ ne unu manlaboristo. Nur intelektuloj (kuracisto, apotekisto, instruistoj kaj aliaj ŝtatoficistoj), etkomercistoj kaj komercaj reprezentantoj (makleristoj, kiel mia patro). Kial? En Aleso la laboristoj - karboministoj, metalurgiistoj, silkŝpinistinoj k.a. - estis ĝenerale progresemaj, kaj apartenis al sindikatoj, anarkista*** aŭ socialista. Internaciistoj, ili tamen ne interesiĝis pri la lingvo internacia. Ĉu eble pro antaŭjuĝo, ke la lernado de lingvo estas tro malfacila intelekta laboro? Ĉu tial, ke iliaj gvidantoj mem ne konsciĝis pri la revolucia karaktero de tiu simpla interkomprenilo? aŭ eble tial, ke oni neglektis kunvoki ilin kaj propagandi en ilia medio? La socialista urbestro (magistrato), kiu klare montris favoron al nia afero per disponigo de la urbodoma salonego kaj de klasĉambro en urbkomunuma lernejo, tamen

*. Vd : "...el la kara infaneco", ĉ.III, 8.

** Societo franca por la propagando de Esperanto.

*** Mi opinias, ke la vortoj "anarkismo, anarkisto" jam longe uzitaj, estas akceptindaj kiel memstaraj radikoj, apud la derivaĵoj "anarkiismo, anarkiisto" (PIV), konforme al la 15a regulo de la Fundamento.

restis ekstere. Kaj eĉ mia kara Klaŭdius* ne venis al ni.

Baldaŭ mi devis konstati, ke estas same almenaŭ en la tuta sudorienta Francio. Sed mi ankaŭ eksciis, ke en kelkaj grandaj urboj en la mondo, klaskonsciaj laboristoj komen- cis uzi la transnacion komunikon**.

3.1913.

Je Pasko, departementa kunveno en Sommières. Inter pluraj dekoj da ĉeestantoj mi estas la plej juna. Post matena vizito de la antikva urbeto kun romia ponto, fine de tagmeza ban- kedo en restoracio, S-ro Dauphin prezentis en esperanto interesan raporton pri la stato de la movado en la mondo, kaj aparte en SFPE. Li nomis parizajn kaj francajn eminent- ulojn, kaj li ne menciis la nomon de Bofronto, kies verkojn mi tre admiris. Tio ŝajnis al mi stranga. Mi komprenis nur kelkan tempon poste, kiam en Avinjono mi eksciis pri la idista skismo, kaj aŭdis la nomon de tiu famega pioniro malglorata per la fi-epitetoj "perfidulo" kaj "renegato".

Posttagmeze nin akceptis en sia domo D-ro Paulet, la loka invitinto al tiu kongreseto, kuracisto kaj melomano. Lia vasta salono, du etaĝojn alta, estis meblita, se tiel diri, per diversaj muzik-instrumentoj : piano, klaviceno, harpo, violonĉelo ; meze de la funda muro tronis orgeno de imponaj dimen- sioj : tiel grandan mi vidis nur en urbetaj preĝejoj. Per ĉiuj tiuj instrumentoj ludis la dommastro mem.

Kelkan tempon poste okazis interregiona kunveno ĉe la romia akvedukto Pont-du-Gard. Belega printempa vetero. En la fundo de la

* Vd. "...el la kara infaneco", ĉ.V.

** Vd ĉi-poste, ĉ VI, 1.

krutvalo, ĉe la piedo de la dujarmila monumento, staris aŭ sidis cento da geesperantistoj venintaj de Langvedoko kaj Provenco. Tie mi unuafoje renkontis la Arlezanojn kondukitajn de la du gajaj impetplenaj fratoj Laget, kaj la Avinjonajn organizintojn de tiu interrenkonto. Ilia loka grupo estis la plej aktiva en la regiono.

Mi memoras, kiel verve unu el fratoj Laget rakontis sian ekzamenon por la atesto pri kapableco en Parizo, kaj la tumultan proteston, kiu tondre plenigis la Sorbonan amfiteatron ĉe la anonco de la temo elektita por la traduko de franca lingvo en esperanton : Montenegro el strategia vidpunkto ! - teksto hirta de malfacilaj fakterminoj.

En la hela sunlumo, la rebrilo de la verda akvo de la rivero pentris sub la grandaj arkaĵoj de la ponto vagajn kvazaŭ marmorajn vejnojn. La proksimo de la profunda akvo kaj la milda venteto flirtanta laŭ la valo envolvis nin per agrabla malvarmeto. Inter la grupetoj hazarde formiĝantaj kaj disiĝantaj viglis facilaj babiladoj, ne ĉiam en tute korekta esperanto, almenaŭ malofte krokodilaj. Vere simpatia etoso.

La horoj rapide forpasis, necesis sin prepari por disiĝo. En subita silento eksonis la beltembra voĉo de la prezidanto de la Avinjona grupo, inĝeniero de Casteljau: altstatura grizharulo, kvazaŭ-zamenhofa barbo, rekta rigardo, neta parolo kun perfekta prononco kaj akcento. Lia mallonga senafekta paroladeto konklude resumigis per tiuj kontentecaj vortoj : "Nia kunveno tre bone sukcesis." Tiel li esprimis ĉies konsataton kaj la impreson, kiun ĉiuj konservos pri tiu belega tago en Esperantio.

4. En tiu sama jaro 1913 fratoj Michelin, la mondfamaj pneŭ-fabrikantoj, organizis konkurson rezervitan al junaj esperantistoj, malpli ol 16-jaraj. Komprenoble mi partoprenis.

La konkurso okazis laŭ du sinsekvaj ŝtupoj. La unua konsistis el libera traduko en francan lingvon de teksto el la Fundamenta Krestomatio, "La Deveno de la Virino" : "Kiam la ĉiopova Mahadeva kreis la belegan Hinduĵon,..." . Por la dua ŝtupo mi devis iri en Arlezon. Multe pli malfacile : en ĉambro sub kontrolo de diplomitaj instruistoj, esperantigi francan tekston kun nura helpo de la sentraduka kaj senklariga "Listo de la Oficialaj Radikoj". La teksto : fablo de Lafonteno, "La Vulpo kaj la Koko", en kiu la ruza vulpo estas trompita de pli ruza koko. Mi longe ŝvitis super tiu tasko. Jam pluraj konkursantoj finis sian. Ĉar mi estis la plej juna, fratoj Laget indulgeme lasis min transi la difinitan tempolimon.

Mi scias, ke en mia traduko estis pluraj mallertajoj, eĉ eraroj, ne gramatikaj sed vortaj, ĉar mia vorttrezoro estis tiam tre malriĉa. Mi ankoraŭ memoras kelkajn el miaj mistradukoj. Tamen mi ricevis premiojn : kelkajn libretojn, jarabonon al "The British Esperantist" kaj la rajton partopreni en loterio, kies premio, por deko da ŝanculoj, konsistos el "aerbapto" sur Farman-aeroplano ĉe la aviadejo Issy-les-Moulineaux. Kiu legis mian broŝuron "...el la kara infaneco", tiu facile imagos, kiom mi revis pri tiu ebla premio. Sed miaj gepatroj ne konsentis, ke mi partoprenu en la lotumado : aeroplanoj estis ja rigardataj kiel danĝeraj aparatoj, rezervindaj por frenezaj sentimuloj. Dek jarojn plu mi devis atendi oportunan okazon por ricevi tiun sopiritan aerbapton.

II. La Esperoj Frakasitaj.

1. La jaro 1914, en kiu mia patro kaj mi ricevis en aprilo, en Avinjono, la "ateston pri kapableco", devis esti markita per la Deka Kongreso en Parizo, komence de aŭgusto. Ĝuste en tiuj tagoj eksplodis la mondmilito. Pri ĉio ĉi mi detale rakontis aliloke.*

Tiu Deka Kongreso, antaŭvidita kiel apoteozo de la "franca periodo" komencita en Bulonjo 1905, fakte signis ĝian finon. La esperanta movado ricevis preskaŭ mortigan baton : la grupoj diserigitaj per la mobilizado de ĉiuj pli-malpli junaj viroj, la internaciaj rilatoj ĉesigitaj. La kongreso, anoncita kiel rekorda laŭ la nombro de ĉeestontoj, limiĝis al unu malferma-kajferma kunsido inter malmultaj venintoj, sen la tiel fervor-espere atendita Majstro (li devis halti en Kolonjo kaj de tie retroveturi).

En tiu sola kunsido tamen, meze de la katastrofa ĝenerala etoso, eksonis per la voĉo de Gabriel Chavet tiu laŭta voko, kiu restis en mia memoro kiel daŭra fonto de espero : "Vivu ĉiam, malgraŭ ĉio, la interna ideo de Esperanto !"

Ho ve ! dum kvar jaroj, kie sin kaŝadis tiu malfeliĉa "interna ideo" ? Ĉie laŭtegis la ŝovinistaj voĉoj. Eĉ la maloftaj esperantlingvaj manifestaĵoj estis naci-propagandaj bultenoj eldonitaj en Germanio kaj en Francio !

2. Patro kaj mi, komprenante ke ne sufiĉas nia "atesto pri kapableco", konsciis, ke ni bezonas plu perfektigi, kulturi kaj profundigi

* "...el la kara infaneco", ĉ.V,8 kaj XIII.

nian lingvoscion. Tion ni ja sentis kiel devon. Kiam mia patro, samtempe kiel S-ro Lauze, estis mobilizita, ni decidis daŭrigi nian lernadon kaj ekzercadon per korespondado inter ni*. Tiel ni pruvos al ni mem nian fidelecon al la idealo.

Nia grupo l'Espero Alesa estis senigita je siaj anoj.

Ankaŭ en Arlezo disfalis la grupo, de kiam soldatiĝis ambaŭ fratoj Laget. Restis nur S-ano Honoré Bourdelon, pro sia kripleco (li estis lama). Mi foje-foje lin vizitis, kiam mi feris ĉe miaj geavoj, kaj ni interparolis esperante. "Esperante" en ambaŭ sencoj, ĉar neniam ni malesperis pri la estonteco, spite ĉiujn ŝajnojn. S-ro Bourdelon ricevadis tiujn ŝovinismajn propagandilojn, kiuj kolerigis lin kiel min, kaj el Genevo la sinsekvajn reform-projektojn de R. de Saussure : Esperantido, Nov-Esperanto... Reage li forĵetis ĉiujn novaĵojn, eĉ ĉiujn neologismojn, kaj restis fervora fundamentano.

En j. 1917, en la plej profunda fundo de la abismo, dolore trafis nin la informo pri la morto de Zamenhof, nur 58-jara**. Tiam ni eksentis kiel nepran devon konservadi en la koro la internan ideon, kaj, kiam estos eble, partopreni per niaj tutaj fortoj en la revigligo de la movado. Mi scias, ke la fidela Bourdelon ne mankis al tiu devo.

3. En tiu sama jaro 1917, la morto estis frapinta en la vicoj de nia grupo. La 25an de januaro, truptransporta ŝipo "Amiral Magon" veturis de Marsejlo al Tesaloniko. Ĝi renkontis germanan submarŝipon. Torpedo trafis ĝin, kaj ĝi sinkis en la daŭro de naŭ minutoj. Pereis 70 viroj - oficiroj, infanteriaj kaj artileriaj soldatoj, maristoj. Inter ili

* "Kontraŭflue", II, 1.

estis nia samideano Rouveret.

André Rouveret (1891-1917), instruisto en Bagard apud Anduzo, hazarde ekkonis esperanton en 1906, kaj tuj lernis sen alia helpo ol broŝuretoj. Baldaŭ li korespondis en esperanto kun ĉiulandaj eŭropaj instruistoj, kaj li preparis vastan studon pri la publika instruado en la diversaj eŭropaj landoj.

La milito haltigis tiun grandan taskon. Post pli ol du jaroj pasigitaj en la tranĉeoj kaj sur la bataalkampoj de la nordfranca fronto, la morto, ĝis tiam lin domaĝinta, atendis lin en Mediteraneo.

Mi revidas lin : vigla juna viro kun hela fizionomio, rekta rigardo, entuziasma parolo - li flue parolis esperanton, kaj estis unu el niaj plej vivaj grupanoj.

Post la milito, lia edzino aktivadis en pluraj kontraŭmilitaj kaj progresemaj movadoj en Aleso, poste en Nimo, kaj ŝi lernigis esperanton al siaj infanoj. Unu el ili estas S-ino Ducellier, kiu nun aktivas en la Avinjona grupo.

III. Timide kaj mallerte.

1. Post la fino de la milito, timide kaj mallerte, la esperantistaro regrupiĝis, kaj restartis la movado per impulso de UEA, kies Geneva Centro feliĉe restadis dum tiuj kvar jaroj ekster la internacia konflikto. Mia patro fariĝis delegito de UEA en Aleso.

Timide kaj mallerte, ankaŭ mi provis reaktiviĝi. Mi estis tri jarojn en Aikso-la-Provenca, lerneĵano de "Artoj kaj Metioj". Tie mi propagandis inter miaj 107 kunlernantoj. Kelkaj interesiĝis. Mi komencis kurson kun deko da lernantoj. Sed ili baldaŭ ĉesis, ĉu tial ke mankis al mi pedagoga sperto, ĉu tial ke nia cerba kaj manekzerca laboro estis tro peza kaj temporaba. Tamen, multajn jarojn poste, pluraj el ili de tempo al tempo sendis al mi poŝtkartojn kun mallonga sed korekta esperanta teksto : ili do ne tute forgesis. Domage : ili povis fariĝi bonaj varbitoj. Almenaŭ ili ĉiam restis favoraj al esperanto : magra konsolo !

De ili mi kolektis abonojn al la revuo "Tra Provenclando", kiun lanĉis fratoj Laget revenintaj en Arlezo. La unua numero estis interesa kaj belaspekta, kun ilustraĵoj sur sufiĉe luksa papero. Bedaŭrinde tiu unua estis ankaŭ la lasta. La fondintoj mistaksis la sukcesebilon de sia entrepreno. Malgraŭ la financa helpo de kelkaj komercaj reklamoj, la revuo estis tro multekosta kontraŭ la eta nombro de la abonantoj : la afero evidentiĝis ne vivipova. Ili volis semi tro frue en tro malriĉiĝinta grundo ; por tiel ambicia projekto la cirkonstancoj estis ankoraŭ ne maturaj.

Kiom da meritplenaj entreprenoj, kiom da valoraj periodaĵoj mi vidis tiel fiaski kaj

morti, aŭ tuj je la naskiĝo, aŭ post efemera vivetado ! Krom kelkaj tre malmultaj, la plena kolekto de la esperantaj gazetoj kaj revuoj similas al vasta tombejo. Tamen ĉiam restas kuraĝuloj, kiuj ree kaj ree provadas.

2. Kiam mi estis en la duajara klaso, en la lernoĵaro 1919-20, alvenis en la unua juna kamarado adepto de ido. Kune tenate per la sama mondlingva ideo, sed dividite pri la praktika solvo, ni pasie interdiskutis. Fine ni venis al akordo pri reciproka lojala provo : ni interŝanĝis lernolibrojn, kaj ĉiu lernos la lingvon de la alia. Tiel mi do eklernis la "linguo internaciana di la delegitaro". Sed baldaŭ mi haltis, konvinkite per tiu provo pri la supereco (laŭ mi) de la zamenhofa esperanto.

Fine de la posta jaro mi forlasis la lernejon, kaj neniam plu aŭdis pri la kamarado. Eble li restis fidela al ido kiel mi al esperanto ; eble, kiel multaj idistoj, li aliĝis al unu (aŭ al pluraj sinsekve) el la aliaj reformprojektoj aŭ planlingvoj. Mi restis kaj restas ĉe mia privata opinio : ke ĉiuj tiuj projektoj (kiujn mi almenaŭ supraĵe ekzamenis) neniel egalvaloras nian "karan lingvon", kiu cetere estas la sola vivanta.

3. En aŭgusto 1921 mi estis vokita por milit-servo en Versajlo. Mi ĝuis la tieajn vidindaĵojn - la reĝan kastelegon kaj la belegan parkon - kaj la proksimecon de Parizo. Sed mi ne forgesis esperanton. Mi vizitis tre maljunan esperantistinon ; tiu afabla sinjorino bonege akceptis min, kaj, tre pia, volis direkti min al katolika soldathejmo. Mi ĝentile dankis, - sed ne revenis.

Alian fojon mi vizitis la tre aktivan samideanon Lionel Chilard, profesian filatel-

iston. Li estis maldika, vigla, ridetema mezaĝulo. Kune elirante el lia domo, ni troviĝis subite ĉirkaŭitaj de kelkaj biciklantaj petolulinoj ridantaj, pepantaj kiel gaja birdetaro. Saltante de sur siaj maŝinoj, ili malkovris, en la flirto de la jupoj, paroĵn da belaj gamboj. Ne malpli rigardallogaj estis iliaj arogantetaĵ vizaaĵoj, dum ili ĝoje ekkriis, kun plej pura pariza akcentado : "BoNAN taGON, sinjoRO ŜiLAR !" Min ili tute simple ignoris. Kvazaŭ mi estus travidebla. Nu, kiu kuragus riproĉi al tiel ĉarmaj knabinoj, ke la "sinjoRO", svelta kaj dande vestita, junaspekta kun kelkaj arĝentkoloraj haroj sur la tempioj, pli kaptis ilian atenton ol ŝtipforma soldato en dikdrapa uniformo ?

Kelkajn tagojn poste, promenante en Parizo sur la Grandaj Bulvaroj, mi renkontis du junajn virojn kun verda stelo ĉe la butontruo. Mi salutis ilin, kaj ni kune vojiris kelkajn minutojn. Mi parolis pri S-ro Chilard, kiun ili bone konis, kaj kies nomon ili ŝerce esperantigis : Kakaslardon. Krom tiu grasa rabelezaĵo, ilia konversacio estis sprita kaj interesa. Tio estis mia unua renkonto kun lertaj parizaj esperantistoj. Strange, mi neniam revidis ilin, nek aŭdis pri ili.

4. Ni estis en somero 1921. Iun tagon, aŝiŝoj kaj gazetinformoj ekkaptis mian atenton : "Malsatego en Sovetio". Sindikatoj kaj maldekstraj organizoj vokas al porhelpa mitingo sur "Pré Saint-Gervais". Tien mi iros.

Grandioza mitingo, iel simila al foiro. Ĉiu organizo, politika, sindikata aŭ flanka, havis apartan standon, kun ŝildo aŭ flago, banderoloj, aŝiŝoj, flugfolioj, ktp. Inter ili la vasta areo estis trastrekita de larĝaj avenuoj, sur kiuj cirkuladis svarmaj homamasoj : precipe laboristoj en dimanĉa

vesto, kun kelkaj intelektuloj kaj studentoj.

Proksime de la enirejo, antaŭ la stando de la idista asocio, deĵoras la vigla, babil-ema K-do Papillon. Mi iras al li kaj salutas : "Bonjorno*", kamarado !

- Bonjorno ! Ka vu esas idisto ?

- No. Me esas espisto.

- Ha ! ankaŭ mi iam estis esperantisto - kaj la konversacio plu daŭris en pure fundamenta esperanto, kiun li tre flue kaj korekte parolis.

Poste mi vizitis la standon de "Liberiga Stelo"**, kun kiu mi estis korespondinta la antaŭan jaron. Fine de la posttagmezo mi revenis piede al la centro de Parizo, kunmarŝante kaj interparolante kun pluraj kamaradoj. Inter ili mi aparte memoras pri Glodeau. Lanti ne estis tie : alie mi certe memorus pri lia tre tipa fizionomio, lia neforgesebla rigardo, lia verva parolo kaj lia "barbo klaskonscia"***.

5. Kvankam mia simpatio sin turnis pli kaj pli al la laborista movado, mi restis ligita al la neŭtrala, al SFPE kaj UEA. Ĉi tiu havis ankoraŭ en tiu tempo sian denaskan strukturon sennaciecan : ne federacio de naciaj societoj (al kiuj estis lasitaj la poresperantaj taskoj), sed tutmonda asocio por la peresperanta laboro, al kiu senpere aliĝis individuaj membroj. Ekzistis ja ĉefdelegitoj regionaj kaj landaj, sed la lokaj delegitoj estis sendependaj.

El la antaŭmilitaj eminentuloj pluraj estis mortintaj, sed en Parizo restis kelkaj, kiuj daŭre aktivis : Aymonnier, Cart, Grosjean-Maupin, Rollet-de-l'Isle, Archdeacon, kune kun pli novaj, kiel Lucien Guadet,

* Bonan tagon. Pr. bonjorno.

** Embrio de la estonta SAT (SAT estis fondita en la sama jaro 1921).

*** Kalocsay, "Rimportretoj".

profesoro pri matematiko, el la familio de la famegaj Carnot. Iam mi aŭdis lin prelegi en franca lingvo pri "la pedagogia valoro de esperanto". Forte strukturita prelego kun trafe elektitaj ekzemploj, belega propagandilo por logi kaj konvinki intelektulojn. Sed poste, elirante, mi aŭdis profesoron Cart laŭte grumbli: "Ho! tiuj matematikistoj!... Sed ne! esperanto ne estas tio! ne estas tia konstruaĵo de la pura spirito! Ĝi estas ja io vivanta, el sango kaj nervoj!" (Mi ne garantias laŭvortan rediron, sed tia estis la senco).

Inter la esperantistaj scienculoj de tiu epoko oni povas ankaŭ mencii profesoron Cotton, elektriston, membron de la Instituto de Francio*, generalon Delcambre, meteorologon, klerajn lingvistojn kiel S-ro Bobin, kiu prezidis la kursojn kaj ekzamenojn en Sorbono, k.c.

Iam, ricevinte noktomezan permeson, mi vizitis la Parizan grupon, kiu kunvenis en amfiteatro de Sorbono. Sufiĉe multa ĉeestantaro. Prelegis prof. Aymonnier, vigle kaj interese. Interalie li humure rakontis pri siaj spertoj de juna studento en Heidelberg. Sekvis diskutado, en kiu partoprenis pluraj lertaj parolantoj. Bedaŭrinde, ne ĉiuj sukcesis liberigi sin de tiu nordfranca akcento sur la lasta silabo.

6. Krom tiuj sorbonaj vesperkunvenoj, sufiĉe multaj parizanoj, inter kiuj ne mankis gravaj eminentuloj, ofte retroviĝis en la aparta grupo, aŭ subgrupo, de la kabareto "Verda Kato"**. Krom la kabaretaj vesperoj, tiu grupo kunvenis ĉiusemajne antaŭ vespermanĝo (la "horo de l'aperitivo") en la bier-

* Tuto de la kvin akademioj, inter kiuj la Akademio de Sciencoj.

** Pri Verda Kato kaj kabaretoj, Vd. ĉ.V, VII, VIII.

ejo Vonesch, sur strato Notre-Dame-de-Bonne-Nouvelle, apud la Grandaj Bulvaroj.

Iun tagon mi tien eniris, uniforme vestita, kaj tuj direktis min al la tablo de la verd-katanoj. Tie sidis, inter aliaj, prof.

Grosjean-Maupin. Li salutis min per jenaj vortoj :

- Mi ĝojas vidi vin, junulo, ĉar estas tro da maljunuloj en Esperantujo.

Jam en 1921 ! Tiun frazon mi ĉiam gardadis en la memoro. Ĉiufoje, kiam mi emus malesperi pro la tro alta meza aĝo de la esperantistoj, ĝi helpas min retrovi la esperon : dank'al daŭra alveno de novaj rekrutoj, la esperantistaro ja ĝuas eternan junecon.

7. Venis aŭtuno. Mi banis min en la mirinda beleco de la Versajla parko. En tiu sezono, dum du aŭ tri semajnoj ĝiaj arboj sin vestas per la plej riĉaj gamoj el oro kaj purpuro, ĉiutage ŝanĝigantaj. Genia Le Nôtre, kies poeta imago kapablis krei tian belegon ! Kredeble li mem ne plene ĝuis ĝin, ĉar en lia vivotempo la plantitaj arboj ankoraŭ ne estis tiel alte kreskintaj, kun tiel ampleksaj foliaroj ; sed li scipovis antaŭvidi tiun admirindan spektaklon por la estontaj generacioj.

Ĉiutage mi tie promenadis, tamen mi trovis ankaŭ tempon por ofte viziti Parizon. Ĉiu-semajne, ĉe kiosko antaŭ Saint-Lazare-stacidomo, mi aĉetis la gazeton de Teo Jung, "Esperanto Triumfonta"*. Sur la bulvaroj, plurfoje mi renkontis promenantojn kun verd-stela insigno, kiujn mi ĉiam alparolis : jen parizanoj, jen provincanoj aŭ eksterlandanoj. Tiel la ĉefurbo ĉirkaŭis min per esperanta etoso. Mi ĝoje konstatis, ke nelonge post la fino de la teruraj jaroj, la movado tiel vigle

* "Esperanto Triumfonta" poste ŝanĝis sian titolon al "Heroldo de Esperanto".

reĝermis kaj jam ekfloras. Sed mi devis baldaŭ foriri, sendite al la kadetlernejo por infanteriaj rezerv-oficiroj en Saint-Maixent, en okcidenta provinco.

Tie mi provis propagandi inter miaj kunuloj, el kiuj kelkaj venis kiel mi de Aikso kaj estis jam pli-malpli varbitaj. Sed ni estis tiel draste trejnataj, tiom fizike kiom mense, ke al ni ne restis tempo por lingvo-lernado. Tial, denove, miaj timidaj kaj mallertaj provoj trafis simpatiantojn, sed neniun veran adepton. Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas...

IV. Intermezo en Germanio.

1. Ekde aprilo 1922 mi daŭrigis mian milit-servadon en okupata Rejnlando. Tiun periodon de mia vivo mi pritraktis el alia vidpunkto en "Kontraŭflue" (Epilogo).

Kiel oficiro, mi tiam ĝuis pli da libera tempo. Vojaĝante tra tuta Rejnvalo, Eĵfel-montoj kaj Palatinato, mi vizitis ĉiun urbon aŭ urbeton, en kiu loĝas delegito de UEA. Kun ĉiuj mi agrable interparolis. Mi memoras pri aparte interesa konversacio kun Max Butin, Lingva-komitatano.

Mi vizitis ankaŭ du freŝbakitajn esperant-istojn. Kun ĉiu el la du okazis sama sperto. Ni flue interparolis, kaj subite la vizit-ato diras :

- Sed... vi parolas, mi parolas... kaj ni nin bone interkomprenas...
- Nu, ne mirige : ni ja parolas esperante...
- Jes... sed... mi lernis nur kvar monatojn, sen instruanto, nur per libro. Ĝis hodiaŭ neniam mi aŭdis esperanton parolatan...

Nu, mi ne imagis, ke estas tiel facile !

Tiel facile, hm ! Mi devas supozi, ke tiuj du posedis apartajn dispoziciojn. Sed, eĉ tiel, en kiu alia lingvo eblus tia rezulto ?

Kiam mia bataliono manovris apud urbo Düren, mi surmetis la ruĝan "tarbuŝ"on kun nigra silka kvasto de la tuniziaj muzulmanoj. Tiu kapvesto, kun miaj nigraj lipharoj kaj mia bruna haŭto, facile prenis min por "nigra oficiro" (la germanoj ne faris netan distingon inter la nordafrikaj araboj kaj la senegalaj negroj).

Iun tagon mi estis en librovendejo. Iu juna sinjorino, scivola, aplombe alpaŝis kaj

alparolis min germanlingve, en familiara cium-
ado :

- Ĉu ci parolas hinde ?
 - Hinde ?! (tiu afabla persono havis neprecizan
nocijon pri tiuj ekzotaj lingvoj. Mi decidis
iomete amuziĝi mistifikante ŝin)
 - Hinde ? Tute ne : araba estas ja mia gepatra
lingvo.
 - Ah ! tiel... araba...
 - Jes. Krome mi parolas france, kaj, kiel vi
povas rimarki, iomete germane.
 - Ho ! iomete ! Ci estas tro modesta : germane
ja tre bone ! (Dankon, sinjorino. Ŝia rideto
estis rava).
 - Kaj esperanton.
 - Esperanto ? Kio estas tio ?
 - Ĉu vi neniam aŭdis pri la mondlingvo esperan-
to, kiu helpas interkomprenon inter la popo-
loj ?
 - Nu...nu... mondlingvo, esperanto...
- Ŝi larĝe malfermis siajn belajn okulojn al
tute nova horizonto.
- Tiam mi min turnis al la vendistino :
- Ĉu vi tenas partiturojn de Wagner-operoj ?
- La brava sinjorinetino ne kredis siajn orelojn.
- Ŝi balbutis :
- Wagner... ci ja diris : Wagner... Ĉu do ci
konas ankaŭ Wagner ?
 - Kompreneble.
- Kaj ĉe tiu lasta bato mi lasis ŝin senvoĉa.
Eble meditanta pri la vasta kulturo de tiuj
"nigraj trupoj".

En la granda magazeno Tietz en Kolonjo, en
la librovenda fako estis aparta bretaro por
esperantaj presaĵoj. Tie mi aĉetis kelkajn
librojn, interalie la romanon de Luyken
"Stranga Heredaĵo".

Iam en tiu librar-angulo mi renkontis kon-
aton. Dum ni interparolis, pasis apude viro
kun verda stelo ĉe la butontruo de sia jak-
refaldo. Li ŝajnis eviti renkonti nin - eble

li ne vidis nin ? Mi skizas ekmovon al li, dirante :

- Ĉu vi vidis ? esperantisto...

Sed la alia, min retenante je la maniko :

- Lasu. Li estas ano de la ruĝa asocio.

Mi estis mirkonsternita. Ĉu do la samideanaro disfendiĝis je malamikaj fratoj ? Kiu kulpas pri tio : Ĉu Adam, aŭ Lanty* (mi ankoraŭ ne sciis, ke tiuj du nomoj kovras la identecon de unu homo), ĉu maltoleremo de la neŭtraluloj, aŭ "neŭtralistoj"?

Tiu incidento longe pripensis min. Mi inklinis proksimiĝi al tiu "ruĝa" organizo naskita de la iama "Liberiga Stelo", kaj jam akirinta ian potencon, sed mi ne sciis, kie trovi informojn pri ĝi.

2. En majo 1923 finiĝis mia militservado.

Kelkajn monatojn antaŭe, tial ke la germana registaro, praktike bankrotinta, ĉesis pagi la milit-imposton, la franca kaj belga armeoj etendis la okupadon, invadante la Rur-regionon. Escepte de malvasta rondo ĉirkaŭ Kolonjo, okupata de la angla armeo (kiu ne partoprenis en tiu invado), ĉiuj fervojistoj, laŭ ordono de sia registaro, ekstrikis, kaj en multaj lokoj sabotis instalaĵojn kaj maŝinojn. La fervoja reto pasis sub kontrolon kaj mastrumadon de franca-belga regio. Tiu ĉi funkciis per profesiaj volontuloj senditaj el sialandaj retoj, kaj, ĉar ili ne estis sufiĉe multaj, krome dungis helplaborantojn.

Tuj post ekŝiĝo el la armeo, mi iris al la regia direkcio en Majenco kaj dungis en la trakcia fako. Tial ke mi ne trovis civilan industrian postenon en Francio nek en francaj kolonioj aŭ aliaj franclingvaj landoj ; tial ankaŭ, ke tiu metio, kiu estis

* Tiel Adam skribis sian pseŭdonimon ĝis 1928.

(Vd. Borsboom, "Vivo de Lanti").

tiu de unu el miaj avoj*, tre allogis min ; tial, fine, ke mi jam tre amis tiun landon.

La perforta okupado de la Rur-regiono sonorigis la signalon de "pasiva rezistado" - ofte ankaŭ aktiva**. La rilatoj de la rejnlanda popolo al okupantoj preskaŭ tute ĉesigis, almenaŭ fariĝis malpli agrablaj, foje eĉ rekte malamikaj. Tamen mi trovis nenian ŝanĝon ĉe la lokaj esperantistoj : de ili mi ĉiam ricevis fratecan akcepton. Ili ĉiam traktis min ne kiel francon, sed kiel samideanon.

Mi loĝis unue en Bingerbrück, ĝuste ĉe la enirejo de la romantika krutvalo inter la montaroj Hunsrück kaj Taunus. Edziĝinte en septembro, mi eklaboris en Majenco, kaj mi kun mia edzino translokiĝis al la najbara banurbo Wiesbaden. Tie ni tuj aliĝis al la loka esperantista grupo, en kiu ni estis, kun S-ro Léon Courtinat, la solaj eksterlandaj membroj.

Sed tio estis jam komence de 1924, kaj mi tro rapidis, preterlasante rakonton pri unu rava tago de aŭgusto 1923, kiam mi estis ankoraŭ fraŭlo.

3. "Nur ĉe Rejn' mi volas vivi,
Nur ĉe Rejn' esti naskita,
Kie la montoj portas vitojn,
Kaj la vitoj oran vinon..."

Lerninte sufiĉe el la germana lingvo, kaj ĉiutage ĝin praktikante, mi povis tion kanti kun la rejnlanda prononco. Ankaŭ plurajn aliajn lidojn, kiuj gloras la verdan riveregon, la "oldan patron" Rejnjon, laŭdas la rejnvinojn kaj prikantas la ĉarmon de la rejnaj knabinoj. Mi jam diris : de mi al tiu lando estiĝis vera amrilato.

* Vd. "...el la kara infaneco", ĉ.I.

** Vd. "Kontraŭflue", Epilogo.

Jam antaŭe mi revadis pri tiu mirbela valo - de post kiam mi deksesjara legis la vojaĝleterojn de Viktoro Hugo. Kaj nun, mi vivis tie, kaj mi travagis la tutan regionon, iam sur rejnŝipoj, multfoje sur mia lokomotivo laŭlonge de la rivero, ofte ankaŭ piede. Mi intime konis ĉiun antikvan historian urbon, ĉiun mezepokan urbeton, kiel Baharah, nomo konata de la esperantistoj* ; mi vizitis la romantikajn burg'ojn sur la altaĵoj, kaj, meze de Rejno, la fortikaĵ-insulon Pfalz kaj la sinistran Musoj-turon. Ĉion ĉi mi ja konis pli ol multaj enlandanoj.

Nu, en tiu jaro 1923, la universala kongreso de UEA okazis en Nurenbergo. Karavano da kongresanoj el Skandinavio, Nordokcidenta Germanio, Britio, Nederlando kaj Belgio, trajne veturintaj ĝis Kolonjo, tie enŝipiĝis en vaporŝipon sur Rejno al Majenco. Kuniĝinte kun ili ĉe la havenstacio Godesberg, mi pasigis sur la ŝipo la preskaŭ tutan tagon kun kvaroj el la sveda urbo Gefle** : unu sesdekjara sinjoro, tre afabla kaj tre kapabla esperantisto, kun tri junulinoj, proksimume dudekjaraj. Sonja kaj Greta estis altstaturaj, blondaj kun bluaj okuloj kaj freŝa hela haŭto; Anna, malpli granda, delikata kaj bruna : kontraste kun la du tipe nordaj knabinoj, ŝi similis al sudeŭropanino. La tri belaj, gajaj, ridemaj. Al ili mi fiere ĉiĉeronis, montrante ĉiujn vidindaĵojn, kiuj seninterrompe sin sekvas, kaj aldonante historiajn kaj legendajn informojn.

Alvenante ĉe la piedo de Lorelej-rokego, aro da gepasaĝeroj amasiĝis sur la pruo, kaj ĥore ekkantis la faman lidon pri la danĝerege bela niksino, kun tiu profunde sentimentala emfazo, kiun la germanoj metas en tiajn romantikaĵojn. Mi trovis tion iomete ridinda, kaj,

* "La Rabeno de Baharah", novelo de Ŝalom Aleĥem.

** Gävle.

kvankam mi parkere konis la poemon de Heine kaj la arion de Silcher, mi ne kunkantis. Por miaj kvar gekunuloj mi tradukis la versojn, ne laŭ la zamenhofa traduko*, kiun mi ne scias parkere, sed laŭvorte laŭ la originalo.

Fine, antaŭ ol atingi la ebenajon inter Bingen kaj Rüdeshheim kun la famega Johannesberg-vitejo, tuj post la lasta kastelo Reinstein, super la Musoj-turo, mi montris al ili la kolosan Niederwald-monumenton sur la dekstraborda montoflanko : la kaskita kaj kirasita Germania, fiere kaj defie rigardante al okcidento, staras tie sian gardon ĉe Rejno.

Ni disiĝis kaj adiaŭis en la Majenca stacidomo. Neniam plu mi aŭdis pri miaj unutagaj geamikoj, sed mi konservis de tiu tago ĉarmoplenan memoron.

Nun ni revenu al 1924.

4. "Intermiksité ! Intermiksité !"

Per tiu vorto Kurt Schönrich, vokante nin al komunmanga tablo, postulis, ke ni sidu laŭsekse intervice, ĉiu viro inter du inoj, ĉiu ino inter du viroj. Schönrich, kiu majstre gvidis la Visbadenan grupon, estis alta svelta sakso preskaŭ kvardekjara, sed li aspektis apenaŭ tridekjara, vigla, gajhumora. Sub lia milde firma diktatoreco, la grupo estis tre vivanta, la kurso akurate sekvata, kaj en liberaj kunvenoj ĉiuj aktive babilis, neniun krokodilis : por ni ne-germanoj, tio estis aparte agrabla.

Inter ni estis unu urba policano. Kiam li deĵoris por reguli la stratan trafikon, li portis sur sia impona uniformo blankan brakrubandon kun verda stelo : Ĉar al tiu fama banurbo venis multaj fremduloj, el kiuj eventuale kelkaj esperantistoj. Iam, promen-

* En Fundamenta Krestomatio.

ante kun franca amikino kaj serĉante sian vojon, mia edzino iris al li kaj petis informon. La amikino admiris "kiel flue ŝi parolas germane". Mia edzino elerarigis ŝin, kaj ŝi tre miris aŭdante pri la lingvo internacia.

Ni akurate vizitadis la kunvenojn, partoprenis en grupaj ekskursoj tra la Taŭnusmontoj - mi aparte memoras pri la belega promenejo "Sub la kverkoj" - kaj en regionaj kunvenoj kun aliurbaj grupoj. En Germanio kiel en Francio, post la kvarjara eklipso, la movado reakiris junecan viglon. Iam en Kaiserslautern ni renkontis, kune kun la lokaj gesamideanoj, trupon da Saarlandaj amatoraj artistoj en folkloraj kostumoj. Ili prezentis spektaklon tute en esperanto, ludante skeĉojn kaj scenetojn, deklamante poemojn, kantante kun akompano de liutoj kaj gitaroj, prezentante ankaŭ popoldancojn. Inter ili elstaris, kun sia juna edzo, la ĉarma junedzino Anni Bonaventura : malgranda, viva, kun nigraj okuloj kaj nigraj krispetaj haroj. Ĉu ŝi - kaj ŝia edzo, laŭ lia familinomo -, estas eble italdevenaj ?

5. En printempo 1924, ni rendezuis kun miaj gepatroj en Strasburgo, kie okazis la nacia kongreso de SFPE. Tiu kongreso, prezidata de S-ro Eyquem, estis bonege organizita de la loka grupo kaj de S-ro Petit el Parizo. En la malferma kunsido, pluraj eksterfranciaj samideanoj alportis salutojn de sialandaj asocioj. Kvankam ne komisiite - ĉar la afero ne estis antaŭvidita - mi per propra iniciato salutis en la nomo de la Visbadena grupo. Mi ricevis varman aplaŭdon evidente destinitan, tra mia persono, al la esperantistaro de la eks-malamika lando.

Inter seriozaj kunsidoj la kongreso bone amuziĝis. Ĉe la bankeda tablo angla sinjoro agrable kantis du kantojn de li verkitajn

kaj komponitajn : unu elegian ("Panjo, ne tiajn ĉevalojn mi petis !"), alian pli gajan, "Mia kongres-amatin'". Mi retrovis kelkajn parizajn konatojn. Inter ili Raymond Schwartz, en la distra vespero, donis brilan specimenaron de siaj spritaj kanzonoj, el kiuj "la Kongres-edziĝo"*.

Ni retrovis ankaŭ la Saarlandanojn, pli proksimajn najbarojn ol miaj gepatroj kaj ni. Por la balo Anni Bonaventura surmetis sian regionan kostumon, kiu tiel plaĉe sidis al ŝi. Kun ŝi plurfoje dancis mia patro, mirinde juna 54-jarulo, kiu ĉiam estis bonega valsisto. Mi enviis lin, ĉar mi ne scipovas danci ; kiel multaj anoj el tiuj generacioj, kies juneco forpasis dum la milito, mi tiam ne vizitis balojn. Ankaŭ mia edzino, kiu cetere estis jam dike graveda.

Fine de tiu jaro, post kelkmonata interkonsento, dum kiu niaj germanaj kolegoj, iom post iom, reprenis apud ni siajn postenojn, ni redonis al ili ilian reton en bona stato, bone reorganizita kaj glate funkcianta. La "Regio de la Fervojoj de Okupataj Teritorioj" estis likvidita. Finc de la germana intermezo : mi revenis en Francion.

* En "Verdkata Testamento".

V. La Folaj Jaroj.

1. Tiel oni nomas en Francio la jardekon 1920-1930, kiu komenciĝis tuj post la militfino kaj daŭris ĝis la apero de la granda ekonomia krizo veninta el Usono, skuanta tutan Eŭropon kun sia akompano el gravaj konsekvencoj : senlaboreco, mizero - faŝismo. Tiujn konsekvencojn oni ankoraŭ ne antaŭvidis, almenaŭ en Francio - kvankam jam estis naskiĝinta la itala faŝismo -, kiam mi revenis en la parizan regionon. La folaj jaroj karakteriziĝis per granda apetito por vivgnado, seksa kaj ĉiaj liberigoj. La t.n. "garçonnes" (in-fraŭloj) mallongigis siajn harojn kaj siajn jupojn, kies rando, unuafoje de post jarmiloj, altiĝis ĝis super la genuoj. Tiaj modaj ŝanĝoj ofte portas en si la signon de pli profundaj tendencoj. Liberigo ne nur de naturaj instinktoj, sed ankaŭ de pensoj. En sciencoj disvolviĝis la aplikadoj de novaj eltrovoj, kiuj parte datiĝis de la antaŭmilita epoko, kiel tiuj de Ejnŝtejn kaj de Planck, sed estis ankoraŭ malmulte disvastiĝintaj. Same en la artoj : faŭvismo, kubismo, "abstrakta" pentrado datumis de la komenco de la jarcento, same kiel en muziko la neklasikaj gamoj, la sinkopaj ritmoj, la dodekafonio*. "La Sanktigo de l'Printempo" de Stravinski, kiu kaŭzis skandalon en 1913, la "Luna Pieroto" de Schoenberg, rigardita kiel barbara, komencis esti pli vaste konataj kaj aprecataj. La ĵazmuziko de la amerikaj nigruloj invadis la malnovan kontinenton. Post triumfo de la Negra Revuo, Jozefino Baker

* Gamo konsistanta el 12 notoj, inter kiuj ĉiuj intervaloj estas egalaj.

fariĝis idolo de Parizo kaj de tuta Eŭropo. En la baloj, al la volupta tango ĵus antaŭmilite importita el Sudameriko, konkurencis la ritmoj de "one-step" kaj fokstroto, ĝis furoros Ĉarlestono*. Apud la klasika dancarto, daŭre vivanta, la rusaj baletoj de Dĵagilev (ankaŭ de antaŭ la milito) alportis novajn formojn; helpe de kolorlumaj projekcioj, Loĭe Fuller kreis fantasmagoriajn figurojn; Isadora Duncan ĉerpis inspiron el la antikveco por per korpa plastiko esprimi modernajn sentojn. Ĉiujn artojn, precipe literaturon, influis la skoloj dadaista** kaj surrealista. En popol-universitatoj kiel en kluboj vizitataj de intelektuloj kaj de scivolemaj amasoj, okazis pasiaj diskutadoj pri ĉiaj temoj artaj, sciencaj, filozofiaj.

En tiu fermentado de ideoj kaj eksplodado de novaĵoj sur plej diversaj kampoj, la esperantistoj fosis sian sulkon. Ankaŭ ili sur propra grundo inventis novajn formojn por sia lingvo-aplikado. Unu el tiuj estis esence pariza: la kabareto.

2. "Jen alvenas klient' tra la pordo-truo!...
(.)"Klient', klient', sidigu nun sen bruo!..."

Per tiu gaja ĥorkanto la kanzonistoj salutas la eniron de ĉiu nov-alvenanto, ĉu eminenta kiel S-roj Cart aŭ Grosjean-Maupin, ĉu nekonata kiel mi.

Jam antaŭ tiu kabareta vespero, ĵus reveninte en Parizo, mi tuj vizitis la sidejon de la Verda Kato. Schwartz prezentis al mi ties "oran libron". Kion mi skribis en ĝi, mi tute ne memoras: certe nenion indan plu-resti por la posteularo. Sed mi legis la

* Originala danco kun iom nerveca ritmo.

** "Dada", fondita en 1916 en reago kontraŭ la absurdeco de la tempo, forĵetis ĉion racian en la tradiciaj esprimformoj.

ĵus-antaŭan skribon ; ĝi estis de la poeto Salo Grenkamp*, ĝi komenciĝis per jena imito de fama apostrofo :**

"Parizo, urbo de miaj revoj..."

Grenkamp havis voĉon kun varma tembro, kiu kvazaŭ martelis la vortojn, nete disigante ĉi-un silabon, sen i-a ligo kun la antaŭ-a kaj pos-ta, stakate, se tiel diri. Li estis la sola, kiun mi aŭdis ĉiam uzadi tiun plej klaran prononcon, kiun Zamenhof deklaris "pure teoria kaj severe regula" (respondo 56 en Lingvaj Respondoj 412.15, p.14) ; kaj mi konfesas, ke el lia buŝo tiu prononco ŝajnis al mi ne malpli eleganta ol la pli kutima.

Mi fariĝis akurata kaj diligenta klubano. Ho gajaj vesperoj, ĉirkaŭ la ĉef-animanto Raymond Schwartz kaj lia edzino Marga Rineta, kiu tiel verve kaj agrable kantis kanzonojn de li kaj de ŝi verkitajn ! Tiuoj kanzonoj humure elvokis esperantistajn temojn, aŭ diskonigis al esperantista publiko per traduko la furoraĵojn de Mistinguett.

La skulpture bela Jeannette Le Cornec, belvoĉa kantistino, delikate modulis famajn kantojn kiel "Amplezur", amĉagren". Ŝia patro, eks-ĝendarmo, perfekte ludis sian rolon en "La Ĝendarmo estas senkompata", de Courteline.

Jen Dubois, Echard kaj ceteraj. Jen k-do Solsona, la alta kataluno kun bela basa voĉo. Jen alia kun bela basa voĉo : la blindulo Masselier, kiu kantas : "La du grenadistoj", aŭ germanan popolkanton : "La karulon ŝi sopiris...", aŭ francan romancon el la "Bela Epoko" : "Ho belulin', ne dormu plu ĉe la mistero de l'kurtenoj!..."

* Salo Grenkamp-Kornfeld, pola judo kiel Zamenhof, mortis, ankoraŭ juna, en nazia koncentrejo-ekstermejo.

** "Wien, du Stadt meiner Träume", titolo de valso de J. Strauss.

Jen J. Nels, kiu ĝuas (maljustan) reputacion de mallertulo, tiel ke, se iu ion rompis aŭ fuŝis, oni diris : "li nelsas" - kaj tiun ŝercon li bonhumore akceptis. Jen la juna anglino Cecilia Sampson ; iun vesperon dum komuna mango, ŝi sidis apud mi ĉetabele, sed malofte sin turnis al mi ; pri tio mi ne spitigis, ĉar ŝia aliflanka kunsidanto estis ŝia estonta edzo, juna magjaro^xkun korvo-nigraj haroj, kiu kompreneble akaparis ŝian tutan atenton. Jen la ĉiam servopreta S-ino Haudebine, jen la bela petolema polino Rozanovska... Nostalgie mi elvokas tiujn gajajn gekompanojn, el kiuj jam tiel multaj estas forpasintaj - kaj la restantaj maljunigis kiel mi.

3. Mi amuzigis per desegnado de humureskaj katoj por illustri programojn. Miaj desegnoj plaĉis al amiko Schwartz. Baldaŭ li petis min illustri lian romaneton "Anni kaj Montmartre". Tio estis la komenco de sufiĉe longedaŭra kunlaborado : sekvis ilustraĵoj por "La Stranga Butiko", "La Ĝoja Podio". Mi diras "kunlaborado", ĉar Schwartz mem nomis min lia kunlaboranto, kvankam mi neniel partoprenis en verkado de liaj tekstoj. Kompense li ja kunlaboris por la bildoj, elektante inter miaj skizoj kaj sugestante ideojn. Tio okazis dum longaj vesperaj interparoladoj en lia gemuta**hejmo en Montmartre (Pigalle-strato), poste en antaŭurbo. Treege agrablaj konversacioj, amikecaj kaj (de lia flanko) spritoplenaj, iafoje kun la ĉarma ĉeesto de Marga ; kaj mi precize memoras pri la bonega gusto de ĉeriz- kaj mirabel-brandoj el lia naskiĝlando Loreno.

Tio estis en la periodo, kiam la Verda Kato estis mortinta. Tie mi lasas geomikojn

* Neologismo iam proponita de Grosjean-Maupin, kaj bedaŭrinde ne prosperinta. Vd. "Glosaro" (germ. gemütlich).

Schwartz - sed ni retrovos ilin.*

Pro la sukceso de la Ŝvarcaj^x verkoj, miaj bildoj disvastiĝis ; Salo Grenkamp deziris, ke mi ilustru anekdotan libreton de li, kaj Bleier, ĉefredaktoro de "Literatura Mondo" en Budapeŝt, petis de mi ilustraĵojn por "La Verda Biblio" de Leizeroviĉ. Poste aperis bildoj de mi (kaj unu de mia patro) en la kolekto de "La Pirato"**.

* Ĉ. VII, 4.

** same.

VI. Hezita Valso. Ĉu neŭtrala, ĉu "ruĝa"?

1. En printempo 1914 en Avinjono, mi aŭdis S-rojn de Casteljau kaj de Chavanon paroli, kun iom konsternitaj voĉo kaj mieno, pri gazeto, kiun ili ricevis de Sanhajo : "La Voĉo de l'Popolo", anarkista ! (ili diris : anarŝista). Do, en la politike avangardaj medioj ekzistas homoj, kiuj interesigas pri la lingvo internacia. Tion mi trovis tute normala : kaj tamen, ankoraŭ nun, kiomope ni estas ?

En Francio estis fondita antaŭmilita "Liberiga Stelo". Kun ĝi mi interŝanĝis leterojn en 1920, kaj en 1921 en Parizo mi fizike konatiĝis kun kelkaj el ĝiaj anoj.* Ili estis al mi tre simpatiaj. En tiu sama jaro en Prago "Liberiga Stelo" fariĝis SAT. Mi apenaŭ eksciis pri tiu grava evento. Mi restis ligita al la neŭtrala movado, SFPE kaj UEA - precipe UEA, kiu aparte plaĉis al mi pro sia sennacieca strukturo volita de Hodler kaj Privat.

2. Do, en 1925, mi daŭre apartenis nur al la neŭtrala esperantistaro.

Komence de tiu jaro mi laboris en Parizo ĉe la administrejo de la Pariza foiro, en la centro de la urbo, proksime de la Borso. Najbara estis la direkcio de la Komerca Ĉambro. Ties vicprezidanto estis S-ro Baudet, inĝeniero de "Artoj kaj Manufakturoj" (Centra Lernejo Pariza). Mi ne konis tiun sinjoron, sed iun tagon mi ricevis de li telefonan alvokon. Mi iris al li en lia kabineto. Li petis de mi redakti, laŭ liaj

* Vd. ĉi-supre, ĉ.III, 4.

precizaj instrukcioj, franclingvan informon aperontan en komerca revuo, koncerne konferencon pri "Esperanto en komerco", kiun li preparis en la kadro de la Foiro.

La esperantistiĝo de tiu grava burĝo estas interesa. Iam la prezidanto de la Komerca Ĉambro komisiis lin pristudi ĝuste tiun temon, esperanto en komerco, kaj prezenti raporton al la asembleo.

- Konsentite, li respondis, sed mi devas averti vin, ke mia raporto probable estos malfavora.
- Nu, ĝi estu, kia ĝi estos. Nur pristudu la demandon.
- Bone ; do mi komencos per lojala provo : mi unue eklernos la lingvon, por scii precize pri kio temas, poste mi kritikos. Li eklernis, kaj tuj interesigis. Li plulernis, kaj entuziasmigis.

Li finlernis, kaj fariĝis fervora esperantisto. Ne nur lia raporto estis tre favora, sed kiam li elektigis vicprezidanto, poste mem prezidanto de la Komerca Ĉambro, li ĉiam favoris esperanton kaj esperantistojn.

Ĉu vi konas multajn ekzemplojn de tia intelekta honesteco rilate al nia afero ? Kiom da famuloj, denaske ĉiosciaj, ne devigas sin al la peno eklerni, pri kio temas ! kaj el la alto de sia superba nescio, ili aplombe orakolas per pezaj kretenaĵoj !

Loĝante tiam en Parizo, pli ol antaŭe mi estis asidua al la semajnaj kunvenoj de la grupo en Sorbono. Tie mi aŭdis interesajn kaj lingve altnivelajn prelegojn. Kelkfoje okazis ankaŭ "parolata gazeto" kaj viglaj debatoj pri diversaj temoj. Baldaŭ mi mem kuraĝis partopreni, kaj eĉ - tiu aĝo estas senkompleksa ! - prezenti prelegojn : unu pri Frederi Mistral kaj lia verkaro, poste alian pri Han Riner. Post tiu ĉi prof. Cart indulgeme gratulis min, kaj bonvolis diskuti

per argumentoj de juro kaj moralo : longa, tre interesa diskutado. Kurioze estas noti, ke kelkajn jarojn poste, kiam mi samteme prelegis ĉe Laborborso en kunveno de la laborista grupo, k-do Platiel*, tiama prezidanto de SAT, kontraŭdiris min per similaj argumentoj. Sed multaj aliaj, precipe junuloj, varme aprobis la liberecanajn ideojn de la moderna saĝulo.

Krom Cart, Grosjean-Maupin, Esselin, kiujn mi renkontis ankaŭ ĉe la Verda Kato, mi havis okazojn por paroli kun pluraj eminentuloj kaj famuloj el la antaŭmilita periodo, kiel Guadet, Bobin, Bastien, Célestin Rousseau, f-ino Cécile Royer, pastro Ramboux, kaj - lastvica sed ne lastranga - Archdeacon, la impeta pioniro en propagando por ĉiaj novaĵoj : aŭtomobilo, aŭdiado, esperanto. Lia adreso estis : Jahto Esperanto, sur Sejno en Saint-Cloud. Li estis rigardata kiel diletanto, simpatia fantaziulo, originalulo. Sed tiu diabla homo estis surprizonta multajn, eĉ longe post sia morto, per tiu pamfleto, "La Mistero de nia surtera vivo"**, verko de liberpensulo en ĉiuj sencoj de la vorto.

Alia originalulo, sed el la nova generacio, estis Ferrari, la timinda propagandisto. Li faris plurajn sinsekvajn metiojn : kelnero, frizisto, ŝoforo de luksaj taksi-aŭtoj ĉe stacio apud Operdomo, por veturigi riĉulojn en longaj ekskursoj, kiel al la kasteloj ĉe Luaro. Ĉiam li uzadis ĉiajn okazojn - kiujn ofte li mem estigis - por propagandi al siaj klientoj. Li ricevis de la Pariza grupo premion en konkurso pri nombro da varbitoj, alte superante ĉiujn kunkonkurantojn. Ja, li varbis multajn personojn. Sed... kiom da

* Vd. E. Borsboom, "Vivo de Lanti".

** Eldonita de la broŝurservo de SAT.

aliaj estis dumvive naŭzitaj kaj mallogitaj per lia teda sistemo ? *

El tiu nova generacio kelkaj aliaj komencis pli-malpli famigi. Krom Grenkamp-Kornfeld, jam menciita, mi nomos ankaŭ la bulgaran filologon Kreŝtanov** kaj la rumanan teknikiston Aisberg, aŭtoron de "Fine mi komprenas radion !" : originalo, kiu poste kun granda sukceso estis eldonita en pluraj nacilingvaj tradukoj. Ilin ambaŭ mi renkontis en Sorbono kaj ĉe la Verda Kato. Ankaŭ la altan japanon Niŝimura, reprezentanton de Oomoto***, Agourtine, la ĵurnalisto, kutima gasto de ĉiuj bankedoj kaj koktel-kunvenoj en Parizo, kaj aliajn...

Post la kunvenoj en Sorbono, grupeto kutime plidaŭrigis la vesperon ĝis malfrue en la nokto, sidante en kafejo ĉe Saint-Michel-bulvardo, en liberaj babiladoj ĉirkaŭ prezidanto G. Warnier**** kaj lia edzino, imponaj tipoj de flandra etno.

Tage, dum liberaj horoj, mi ofte vizitis en Clichy-strato apud Montmartre, preskaŭ fronte al Casino de Paris, la Centran Liberejon. Tie S-ro Dauphin, kompetenta, aktiva kaj sindonema, helpata de malmultaj kunlaborantoj, pakadis dikajn librokvantojn sendotajn al Japanio aŭ aliaj foraj landoj.

3. Baldaŭ mi estis elektita kiel kasisto de la Pariz-regiona Federacio de SFPE, kaj tial membro de ties plenumkomitato. La komitato kunsidis ĉiumonate en la vasta kabineto de la prezidanto, S-ro Grosjean-Maupin, direktoro de la ŝtata Instituto por junaj blinduloj. Poste en la ne malpli vasta kabineto de la nova prezidanto S-ro Jean Couteaux,

* Mi suspektas, ke tiu frazo estis al mi inspirita de ĵaluza spitiĝo... ** Efemera redaktoro de "Sennaciulo" (Vd. Borsboom, "Vivo de Lanti"). *** Filozofi-religia movado, intime ligita kun esperanto. ****Kunaŭtoro, kun G. Chavet, de la bonega lernolibro "Esperanto-Manuel".

direktoro de Cochín-hospitalo, ankaŭ tre klera esperantisto : li estis la unua, kiu ricevis la ateston pri altaj esperantaj studoj*.

Mi partoprenis plurajn federaciajn kongresojn, inter kiuj unu en Puteaux, kie la junaj fratoj Llech kun kelkaj aliaj plaĉe ludis la propagandan komedieton "L'héritage Clodarec". En tiu ruĝa urbo ni defilis surstrate kun nia verda flago ; general-intendantanto Bastien estis en uniformo. Poste, dum la tagmanĝo, li rakontis ĉetabla (mi sidis fronte al li) : "Inter la ĝapantoj estis brava laboristo, kiun mi aŭdis diri : - Kion faras ĝeneralo en tiu kompanio ? Mi respondis al li : - Ni estas kamaradoj, ĉar mi parolas la lingvon de la homaro."

Iam la komitato devis arbitracii konflikton inter S-ro Delanoue, ĉefdelegito de UEA por la pariza regiono, kaj la ĝeneva estraro. Povas ŝajni strange, ke tiu estraro akceptis enmiksiĝon de fremda asocio en siaj internaj aferoj**, sed tiel estis. Ĝenevo estis reprezentata de S-ro Poncet, medicina doktoro, kiu venis speciale de Liono (tie estis lia sidejo kiel ĉefdelegito de UEA por tuta Francio). Ni klopodis por kompromisa aranĝo, kun aparte efika partopreno de S-ro Couteaux kaj de advokato Dronchat, kaj sukcesis. Kelkan tempon poste ni havis la plezuron vidi Edmond Privat, veninta en Parizo, interŝanĝi amikecan manpremon kun Delanoue - en unu ĝaja vespero ĉe la Verda Kato.

Sed tiu persona incidento, momente sensekva, estis signo de pli grava kaj profunda krizo. La fondintoj de UEA, Hodler kaj Privat, kiel mi jam diris, starigis ĝin sur bazo tutmonda, konsistanta el individuaj membroj senpere aliĝintaj, kaj la tiam estraro Privat-Jakob firme konservadis tiun

* La dua estas G.Waringhien. ** Mi memorigas, ke tiam UEA kaj SFPE estis tute sendependaj unu de la alia.

sennaciecan strukturon. Kontraŭ ĝin sin levis kelkaj parizanoj. Tiuj ĉi, por skuiton, kion ili rigardis kiel Genevan hegemonion, volis transformi la asocion en konfederacion de naciaj societoj. Inter ili plej aktivis mia amiko Dubois, kun kiu mi havis pasiajn diskutadojn. Fine, la naciistoj (inter-naciistoj) skisme fondis IEL*. Poste ili plene sukcesis, kiam IEL, kunfandita kun UEA, trudis al ĝi, sub la malnova nomo trompe konservita, sian propran plurnaciecan strukturon. De tiu malnova afero, ĉu ni ne vidas nun spurojn en la freŝdata krizo de UEA kaj de la tuta neŭtrala movado ?

4. Tiuj internaj malpacoj en la neŭtrala medio igis min pli kaj pli proksimiĝi al la laborista, kun kiu mi jam longe sentis min en samideaneco, kaj al SAT, kiu senkompromise starigis la principon de tutmonda sennacieca organizo surbaze de klasbatalo.

Tiun evoluadon akcelis la influo de K-do Julien Piron, kun kiu mi fondis grupon en Joinville-Champigny (tiam mi laboris ĉe Pathé-Cinéma en Joinville, kaj loĝis en Champigny). Tiuj du najbaraj urbetoj havis civitanajn plimultojn de maldekstra tendenco. Komence mi pensis pri neŭtrala grupo sendependa, kies anoj aliĝus aŭ ne al unu aŭ alia asocio. Sed Piron insistis, ke ni aligu la grupon al FEO**, fondita en 1923, dirante, ke tio plifaciligos nian propagandon en laboristaj medioj - kaj li facile min konvinkis. Al nia grupo aliĝis, krom komencantoj, kelkaj ĝis tiam izolitaj esperantistoj, kiel S-ro Rémy, progresema blindulo, kaj mia pacista amiko Raymond Lefebvre,

* Internacia Esperanto-Ligo

** Fédération Espérantiste Ouvrière = Laborista esperantista federacio.

ambaŭ loĝantaj en Champigny.

Ni konservis amikecajn rilatojn kun neŭtraluloj. Iam ni venigis al Champigny, por publika kunveno en la urbodomo, S-ron Delanoue kun lia "propaganda taĉmento"* ; alian fojon, en la popoldomo, venis oratori K-do Pâris, el SAT kaj FEO.

Mi ofte vizitis neŭtralajn grupojn en najbaraj urboj, kiel Saint-Maur. Iam en la tiea grupo, meze de bone komencita kunveno, subite eksplodis inter du ge-estraranoj stulta persona disputo. La aliaj membroj, kaj mi, konsternite, vane provis repacigi la du furiozulojn - kaj de tiu tago la antaŭe vigla grupo ne plu vivis. Tiel, tro ofte, la vivo de grupo dependas de du personoj, eĉ de ununura.

En Saint-Maur vivis ankaŭ izolita esperantisto : S-ro Léon Méras, konata kiel aktiva propagandinto en la framasonaj medioj. Emerita kaj tre maljuna, li retirigis en "familia pensiono", kaj jam multajn jarojn li ne vidis samideanon. Tamen li ne forgesis la lingvon, kaj mia vizito kaŭzis al li ĝojon. Kial mi ne renovigis ĝin ?

En decembro 1930, Pastro Ĉe** venis en Parizon por prezenti sian originalan kolekтивan instruadon per rekta metodo. La geologia amfiteatro de Sorbono, impone vasta, estis plenplena. En ĝi regis nepriskribebla etoso. En kvazaŭ religia silento sonis laŭte kaj klare, sen mikrofono, la demandoj de la gaj-impeta pastro aŭ de lia ĉarma akompanantino. Ili invitis la aŭskultantojn respondi "laŭte, kuraĝe kaj elegante", kaj tiam estis impresa rezulto : centoj da voĉoj senhezite aŭdigis ĥoran respondon. Ĉiuj sci-

* Vd. R. Schwartz : "La Stranga Butiko".

** Pastro Andreo Cze, mortinta en 1979.

povis konstrui korektajn frazojn, ĉiuj parolis flue kaj senerare. Nekredeble !

Sur ĉiuj vizaĝoj brilis entuziasmo... Tamen mi, ĉiama pesimisto, sentis interne ian malkomforton. En kelkaj lecionoj, tiom da diversaj homoj povis fariĝi lertaj esperanto-parolantoj... Sub tiel grandega sukceso mi subflaris ion ne kontentigan por la inteligento. Ĉu Ĉe ne estas ia magiisto, ĵonglisto, iluziisto ? Mi rememoris la aforismon : la tempo ne respektas tion, kion oni faras sen ĝia helpo. Ĉu tiel rapide kreskinta rikolto ne samrapide velkos ? El tiom da fulme bakitaj esperantistoj, kiom da praktikantoj restos ?

Eble tiu opinio estas ne ĝusta, nek justa. Se ja ne multaj restas, tamen almenaŭ kelkaj. Nu, kiu alia metodo certigas pli da sukceso ? Tiurilate mia propra sperto estas humiliga. Mi instruis al dekoj da lernantoj, sume certe pli ol cent ; kelkaj fariĝis veraj esperantistoj : mi povas ilin kalkuli per la fingroj de unu mano*. Se la Ĉe-metodo eble ne sufiĉas por plene formi tre kapablajn esperantistojn, ĝi havigas al tiuj kelkaj almenaŭ tri netakseblajn akirojn : la emon plulerni por pliperfektigi, la kutimon kuraĝe paroli, kaj la ĝustan akcenton.

Mi iomete interparolis kun la pastro-instruisto. Altstatura, juneca, tre afabla, li certe disradiis magnetizan forton. Sorĉaj estis lia rideta vizaĝo kaj lia beltembra voĉo. Natura logisto, certe, kaj lertega pedagogo, sed tiuj personaj ecoj sole ne klarigas esceptan sukceson : oni ja scias, ke pluraj aliaj, aplikante lian metodon, atingis samajn rezultojn. Do kion konkludi ? Verŝajne, ke li majstre asimilis la genian elpensajon de la Majstro, kaj ke, por instrui aliajn, li mem elpensis genian metodon.

* Inter ili mi aparte fieras kalkuli k-don A. Blondiaux.

5. Alian fojon mi vidis en Sorbono plenplenan amfiteatron, kaj tiu estis la Granda : okaze de la Universala Kongreso de UEA, 1932. Solena malferma kunsido. Subite vibras "La Espero", ludata de regimenta muzikistaro en uniformo - kio ŝajnis al mi stranga. Tiuj muzikistoj, cetere bonegaj, ludis konforme al la takt-indiko de la komponisto F. de Ménil : "movo de milita marŝo" (subkomprenu : de moderna franca milita marŝo, multe pli rapida ol la lantpaŝaj marŝoj kun fifroj kaj plat-tamburoj el la tempo de Frederiko IIa aŭ de Napoleono). Tiu nekutima ritmo surprizis multajn, precipe alilandanojn, kiuj kantis "la Esperon" kiel solenan religian himnon. Tamen, post momenteta ŝanceliĝo, ĉiuj, forprenataj en entuziasma kirlo, hore sekvis la diablan "militmarŝon" : la pacaj batalantoj komuniis en fervoro kun la Marsaj latunaj instrumentoj. Strange, mi ripetas : la kontraŭmilitaj vortoj akompanataj de arma fanfaro... sed oni scias, ke la regimentaj muzikistoj, ne disponante tempon por trejniĝi en manipulado de armiloj, ne estas veraj militistoj : en milito ili ne portas armilojn, sed blankan brakrubandon kun ruĝa kruco, kaj servas kiel brankardistoj.

Dum tiu kongresa semajno mi ofte paŝadis sur la stratoj de la Latina Kvartalo kun la speciala insigno de la Parizaj esperantistoj. Per ĝi provincaj kaj precipe eksterfranciaj kongresanoj sciis, ke ni povas ilin helpi por elturniĝi tra la malfacilaĵoj, embarasoj kaj kaptiloj de la urbeĝo.

En la interkonatiĝa vespero mi havis la plezuron renkonti Majencan katolikan pastron, kiun mi ekkonis jam naŭ jarojn antaŭe en kunveno de lia urba grupo. Li donis al mi novaĵojn pri tiu grupo kaj pri Schönrich kaj la Visbadenanoj*.

* Vd. ĉi-supre, ĉ. IV, 4.

6. Paralele mi pli kaj pli aktivis en la laborista movado. En 1934 mi aliĝis al SAT, plu restante membro de UEA kaj de SFPE ; sed mi ekŝiĝis el la federacia komitato, kvankam la aliaj komitatanoj insistis por restigi min, asertante, ke mia aparteno al laboristaj organizoj ne obstaklas. Tiuj estis veraj neŭtraluloj - ne sektemaj neŭtralistoj.

Mi ofte ĉeestis kunvenojn de la FEO-grupo. El la tiamaj kunsidantoj, kiel multaj malaperis ! Unue mortis la juna fervora Ozerée. Poste sin mortigis la tiel simpattia bubo "Bubo", poste la aminda Margareta Aspès. Forpasis Glodeau, Cachon, Meyer, Robert kaj aliaj, en 1947 Lanti, pli freŝdate Ida Karmazin la babilema.

En tiuj jaroj post 1930, la kunvenoj estis ofte skuataj de pasiaj diskutoj kaj disputoj inter diverstendencaj partoprenantoj. Meze de la ortodoksaj komunistoj, plej akre mordemaj, elstaris la juna Malfère.

Iam iu juna kompartiano, signante al Lanti, impete ekkriis : "Tiu kamarado estas perfidulo !". La atakito leviĝis kun sia ironia brilo en la okuloj, trankvile dirante : "Nu, ni volas iomete amuziĝi kun tiu kamarado." Li komencis direkti al li kelkajn ŝajne facilajn demandojn, al kiu la alia memfide respondis. Sed baldaŭ la kompatinda knabo, implikita en la reto de la Lantia dialektiko, ekbaraktis en propraj kontraŭdiroj, balbutis, ruĝiĝis pro konfuzo, fine silentis. Li aspektis kiel taŭro, kiu atendas la decidan spadobaton. Nia barbulo estis batalema kaj pikema, sed ne kruela. Li domaĝis sian tro malfortan kontraŭulon, kaj ne volis peli ĝisekstreme sian triumfon : la batalo estis vere tro malgala, li ne pludaŭrigis ĝin.

Pli kaj pli ligite al SAT, mi ofte vizitis la sidejon, kie jam deĵoradis Banner kaj

Barthelme. Tie mi renkontis multajn gekamaradojn, inter kiuj ge-Dazun, kaj Avid*, kiu kun Waringhien franclingven tradukis la "Manifeston de la Sennaciistoj" de Lanti, Despeyroux, fizike kripla, sed kun vigla batalema spirito kaj impeta parolo, k.c.

En 1935 la SAT-kongreso okazis en Parizo. Lanti ne aperis, krom en la lasta kunsido, por eviti, ke lia persono estu kaŭzo de tro akraj konfliktoj**.

En la malferma kunsido la OKK komisiis min por simultane traduki franclingvan paroladon de Georges Pioch, fama pamfletisto kaj polemikisto. Mi senpripense akceptis. Kiel malsingarde ! Tuj je la unuaj vortoj mi komprenis : por senprezare traduki frazon post frazo tiel alte literaturan improvizaĵon, necesus esti mem majstro en retoriko. Sentante min tute nekapabla, mi rezignis. Min anstataŭis k-do Pâris, pli memfida. Lia traduko estis proksimuma, plata kaj pala kompare kun la brilega parolo de la oratoro - sed tiuj, kiuj ne komprenis ties lingvon, aplaudis tiel forte kiel la franclingvanoj.

Tiu k-do Pâris ŝajnis tiam plej ĝisosta SAT-ano... En 1945, per letero de Glodo, mi eksciis, ke li tiam aktivas en la tre neŭtrala UEF fondita de S-ro Petit, kaj draste atakadas siajn eks-amikojn SAT-anojn. Kontraŭ la opozicio de Micard, vera neŭtralulo, Petit kaj Pâris triumfigis en UEF sian kontraŭ-SAT-an tendencon, kaj sukcesis enkonduki en la statuton devigan aliĝon al IEL.

* Kie li estas nun ?

** Vd. E. Borsboom : "Vivo de Lanti".

VII. La Popolfronto.

1. Ekonomia krizo, marasmo, salajro-malaltigoj, maldungoj, senlaboreco, financaj skandaloj... En la sanga nokto de la 6a de februaro 1934, sur Konkord-placo, la respubliko apenaŭ ne falis sub la battoj de minacanta faŝismo. Sed al tiu minaco respondis fortega reago de la popolo.

La 6an sur Konkord-placo la komunistoj troviĝis flanko ĉe flanko kun la faŝistoj ; sed jam tri tagojn poste, kompreninte la danĝeron de tiu taktika eraro, ili per vigla manifestacio nete apartiĝis kaj rektigis sian pozicion.

La 12an, vokite de la potenca CGT*, la laboristaro en tuta Francio strikis kaj leviĝis kiel tajdego. La plej grandioza manifestacio okazis en Parizo. De Vincennes-Portego ĝis Naci-Placo, sur la kilometrojn longa avenuo marŝis densa kolono da homoj gravmienaj, konsciaj pri la seriozeco de la situacio kaj la signifo de sia elmontrado. Alveninte sur la vasta placo, ni rondiris interne de ĝi. Sur ĉiuj disradiantaj stratoj staris imponaj taĉmentoj de policistoj kun kasko kaj armiloj, ankaŭ tre gravmienaj. Neniu incidento. La popolo, certa pri sia forto, restis tute trankvila, kaj verŝajne la registaro kaj ĝia polico, escepte, ne enŝovis provokistojn inter la amason. La manifestacio kviete disiĝis : tio sufiĉis. La impeto de la puĉemaj faŝistoj estis rompita, senespere haltigita. En tiu tago spontane sin anoncis la baldaŭa naskiĝo de la popolfronto.

* Ĝenerala Konfederacio de Laboro, kies gvidantoj tiam ne estis kompartianoj : la komunistoj estis apartiĝintaj en CGTU.

De tiam sekvis aliaj grandaj manifesta-
cioj, en kiuj pli kaj pli fratece kunmarŝis
plej diverstendencaj maldekstruloj, de
radikalaj respublikanoj ĝis trockistoj kaj
anarkistoj. Eĉ "fajrokrucanoj"*laboristoj,
dumtempe delogitaj de faŝista ligo, nun ek-
komprenis, kie estas ilia natura loko, kaj
kuniĝis kun siaj labor-kompanoj. En ĉiuj
tiuj unuecigaj manifestacioj partoprenis la
laboristaj esperantistoj kun siaj flagoj
kaj banderoloj. Mi marŝis apud S-ro Rémy,
la blindulo, tenante lin je brako. Lia dis-
tingita paŝado, lia serena vizaĝo kun blan-
ka pinta barbeto igis lin aparte rimarkinda.

2. En tiu fervora strebado al unueco, kiu
tiam movis la laboristan klason kaj ĉiujn
liberamantojn, la komunistoj mildigis kaj
baldaŭ ĉesigis siajn atakojn kontraŭ ali-
tendencaj kunbatalantoj. Ŝajne laŭ supera
ordono, ili likvidis, unu post alia, siajn
paralelajn organizojn : sindikatan (CGTU
reunuiĝis en CGT), sportan, k.a. Ankaŭ en
la esperanta movado. En 1932 la komunistaj
kamaradoj, anoj de IPE**, ekŝigis el FEO kaj
fondis filion aŭ vasalan organizon de IPE
sub la nomo Federacio de proletaj esperant-
istoj, siglo FEP, kun sidejo en Nimo (D-ro
Salan), poste en Orleano (Marcelo Boubou).
FEP konkurencis FEO'n, eldonis "Nova Racia
Kurso"n, kun pli bolŝevista tendenco, kaj
nin kontraŭbatalis. Nun ĝi reproksimiĝis.
En aprilo 1936, FEO en Havro kaj FEP en
Orleano konsideris reunuiĝon.

Mi estis elektita de FEO kiel membro de
la delegacio komisiita por traktado cele al
tiu reunuiĝo. La kunveno okazis en Parizo.
La delegacio de FEP estis kondukata de K-do
Boubou, unu el la du aŭtoroj de "Cours

* "Fajro-krucoj" estis la nomo de patriota ligo fondita
de eks-batalantoj de la milito 14-18. ** Internacio de
Proletaj Esperantistoj, skisme fondita de la kompartia
frakcio en SAT.

Rationnel", kiun mi en tiu okazo unuafoje, kaj, ho ve, lastafoje renkontis*. La diskutado estis tre facila : fakte la FEP-reprezentantoj konsentis pri ĉiuj niaj postuloj. Tamen ni ne volis trudi al ili simplan revenon en la forlasitan ŝafejon. Rapide estis decidita kunfandiĝo de ambaŭ asocioj en unu novan, FET (Fédération espérantiste du Travail, t.e. de la Laboro, aŭ de la Laboristaro). FET estis oficiale fondita en kongreso (Parizo, 11. de julio 1936), kun referenco al la Popolfronto.

Lanti restis aparte de tiu intertraktado. Sen neglekti la lokan aktivecon, li estis pli kaj pli absorbata de diversaj okupoj : verkado, redaktado de "Herezulo", korespondado, kaj la grava vortara afero ; post la dua eldono de PV (1934), li, kiel diras Waringhien**, "kovis pli aŭdacan projekton": tiun pri plena ilustrita vortaro.

Iam mia edzino kaj mi ĉeestis, en vastega kampadejo, interrenkonton de multegaj gejunuloj, precipe Junular-gastej'anoj. Sub la blua ĉielo, en brila sunlumo, regis frateca etoso de popolfronto. Promenante ni renkontis plurajn esperantistojn, de ni konatajn aŭ ne. Margareta Aspès tute nature ciumis min, kaj mia edzino estis iomete ŝokita : iel etburĝe edukita, ŝi ne sciis, ke tio estas ĝenerala kutimo en la Junular-gastejoj.

3. En Champigny mi havis komunistajn amikojn favorajn al esperanto. Pere de ili mi provis propagandi en la societo "Amikoj de Sovetunio". Tiucele mi entreprenis korespondadon kun sovetaĵaj esperantistoj. Studentoj de la Instituto de Journalistiko en Minsk, Blank-

* Kelkajn jarojn poste, Boubou mortis en nazia ekstermejo.

** PIV. Ĝenerala antaŭparolo.

rusio, petis sendon de alilandaj gazetoj. Mi sendis al ili specimenaron el la franclingva gazetaro ; en la pakajo, krom ĝeneral-informaj ĵurnaloj, kunestis ekzempleroj de plej diverstendencaj politikaj organoj : de l'Action Française, rojalista, kaj l'Echo-de-Paris, tre dekstra, ĝis l'Humanité, komunista, kaj Le Libertaire, anarkista. Mi naive supozis, ke almenaŭ al studentoj pri ĵurnalistiko estas permesite, eĉ rekomendite, legi ĉiajn ĵurnalojn. Nu, jen venis neimag-ebla respondo : "Dankon, sed de nun sendu al ni nur l'Humanité" ! Konsternite, mi per tiu propra sperto ekkomprenis la pravecon de Lanti kaj Ivon, kiam ili avertis pri la vera stato de penslibereco en Sovetio*.

En 1937, meze de la popolfronto la interrilatoj ree malboniĝis. Interne de FET la eks-FEP-anoj rekomencis siajn manovrojn kaj atakojn ; la etoso refariĝis malagrabra kaj malfavora al efika laboro. Tiam kelkaj parizaj eks-FEO-anoj regroupiĝis en senstatuta grupeto, kiun ili nomis SAT-Amikaro. Ĝi estis la kerno de la nuna samnoma LEA** en Franc-lingvio.

4. Pli kaj pli okupate per la laborista movado, la popolfrontaj manifestacioj kaj, ekde julio 1936, la mitingoj por helpo al la hispana popolo en batalado kontraŭ militista faŝismo, mi iom post iom foriĝis de la neŭtralaj rondoj. Sed mi restis tre ligita kun Schwartz kaj liaj kompanoj.

Jam en 1926 mortis la Verda Kato, trapikita per filistra pluvombrelo***. Kerno da fideluloj klopodis por pluvivigi ĝin - sed sen

* Vd. "Leteroj de E.Lanti", leteroj n^o 15, 16, 17, 18.

** Laborista Esperanto-Asocio.

*** Vd. "Verdkata Testamento"n kaj ties titolpaĝon kun tre arta bildo, verko de Adolf Hartmann el Munkeno.

Raymond kaj Marga, kion ni povis fari ? La kabaretaj vesperoj vegetis, malvigligis kaj baldaŭ ĉesiĝis. (1927)

Tamen la verva naturo de Schwartz ne povis kontentigi per nura verkado de libroj. En 1933 li lanĉis sian revueton "La Pirato", "kajeroj por satiro, humoro kaj libereco... relativa". La Pirato "kaperis" ĉiumonate. Ni vespere kunvenis en kafejo de la Latina Kvartalo, gaje babilante, dume serioze diskutante pri la enhavo de la venonta numero ; tiel ni konsistigis kvazaŭ senformalan redakto-komitaton. Tie retrovigis kelkaj malnovaj verdkatanoj, kun kelkaj novaj. Inter tiuj ĉi estis unu junulo, kiu jam multon promesis, kaj tiun promeson li brile tenis : mi parolas pri Roger Bernard, kiu jam longe distingigis per sia verkista talento ; nun lia nomo estas konata en nia literaturo, kaj li estas membro de la Akademio. Roger kaj lia ĉarma fratino, Simone, asidue ĉeestis niajn kunvenojn.

La Pirato "kaperis" de junio 1935 ĝis decembro 1937. Tiam la kapitano, promociite en sia bankista profesio, kaj de tiam ŝarĝite de tro pezaj laboro kaj respondeco, dronigis sian ŝipon. Kompreneble neniu sin sentis kapabla por repreni kaj tenadi la stirilon. Dua eklipso de la kanzonista humuro.

Tamen mi devas menciigi, ke en tiu sama periodo, Montmartra sekcio de la Pariza grupo, sub la nomo "Bolanta Kaldrono", iel revivigis la spiriton de la Verdkata rondo, kaj provis ekspluati la kanzonistan ercvejnnon. Cetere ĝi nomis Rajmundon Schwartz mem sia honorprezidanto, samtempe elektante kiel honoran membron Gabrielon Chavet, antaŭmilitan pioniron de esperanto en la kvartalo, kaj la unua aktiva prezidanto estis nia amiko Nels. La Bolanta Kaldrono

funkciadis ĝis 1939. Pri ĝi mi ne povas atesti, ĉar, forlasinte Parizon, mi persone ne konis ĝin. Laŭ Nels, neniam la etoso estis de vera kabareto, kiel siatempe en la Verda Kato kaj poste en la "Tri Koboldoj"*, same animita de Schwartz.

Kion do havis en si tiu Lorenano, ke li tiel majstre asimilis kaj enkorpigis la genion de la parizaj-montmartraj kanzonistoj? "Nur de Parizo estas bona beko", jam diris Villon** - sed estas bone sciata, ke multaj el la plej parizaj parizanoj estis naskitaj en malproksimaj provincoj. Plej mirige estas, kiel Schwartz scipovis transponi en esperanton tiun tre specialan humurformon, en maniero plene kaptebla de internacia publiko, tiel kreante en nia literaturo tute novan ĝenron.

5. En tiu sama periodo mi kelkfoje manĝis en la "Vegetalisa" restoracio, Mathis-strato. Vasta ĉambrego meblita per longaj tabloj el kruda ligno kaj longaj lignaj benkoj. Sur komuna tablego vice sidis diversaj ujoj kaj pladoj kun verdaĵoj, salatoj, krudaj legomoj, fruktoj. Ĉiu tien iris kun telero kaj manĝilaro kaj sin mem servis, sen limigitaj porcioj. Sur la manĝotabloj, kruĉoj da freŝa akvo. La malalta kosto de la manĝaĵoj kaj la sparta simpleco de la kadro havigis al tiu loko aparte proletecan karakteron. Tie regis kamaradeca etoso, tie aŭdigis multaj lingvoj kiel ĉe Babel-turo, sed inkluzive (kaj eble pleje) esperanto.

En 1936 Lanti forlasis Parizon kaj Francion, neniam revenonte. Mi vidis lin en lia hejmo, Corbéra-strato. Tie li ankoraŭ loĝis

* Vd. ĉ.VIII, 4.

** François Villon, franca poeto (XVa jarcento).

kun K-dino Limouzin, kiun mi ekvidis la unuan kaj lastan fojon. Tio estis mia lasta renkonto kun la Herezulo, la Mondvaganto, la Sennaciulo. La sola, dum kiu mi iom longe parolis kun li en aparteco. Sed tiu konversacio preludis al vigla korespondado, kiu daŭris dek jarojn, preskaŭ ĝis la tago de lia morto.

En 1937, ankaŭ mi forlasis Parizon.

6. Mi tamen revenis sufiĉe ofte por mallongaj restadoj en la ĉefurbo. Kaj, iun tagon...

"Jen alvenas botel'

Kun furzema korko.

Jen alvenas botel'

En glaci-sitel' !

Botel', botel'.

Botel' da ĉampanvino,

Botel', botel'...

... Kaj kiu pagos ĝin ?"

Ĝi, la ĉampanbotelo, estis mendita kaj antaŭpagita de Echard, kiu, loĝinte kelkan tempon en Ateno, ĵus revenis Parizon. Por festi tiun interretrovon, nia amika rondeto (Schwartz, Dubois, Nels, kelkaj aliaj) kunvenis kun li ĉirkaŭ tablo en Montmartra kafejo. Nia tradicia kanto salutis la amikon kaj la botelon. La etoso estis tiu de la Verda Kato kaj de la Pirato. Mi ne povis imagi, ke lastafoje mi parolas kaj trinkas kun Echard.

Li estis unu el niaj plej gajaj kaj fajne spritaj kompanoj. Komencinte esperantigi la faman satiran verketon de Voltero, "Kandido", li donacis al mi franclingvan ekzempleron, por ke mi preparu ilustraĵojn. Lia tradukonieniam aperis, ĉar Lanti pli rapidis. (Ĉiu el ili ne sciis, ke la alia entreprenis la saman taskon). En mia bretaro restas la libreto, kiun mi fojfoje relegas : por mi altvalora memoraĵo pri nia bona, kara amiko.

VIII. Tra Provincoj.

1. En Klermonto (Clermont-Ferrand) mi tuj rilatiĝis kun la lokaj esperantistoj. Inter ili ni havis la surprizon retrovi S-ron Courtinat, konitan en Visbadeno, kaj ni konatiĝis kun lia edzino. Kun piano-akompano de ŝi, ni iam en ilia hejmo kune kantis esperante ; interalie la polan popolkanton esperantigitan de Salo Grenkamp, kun forta ritmo :

Lunde ni matene
 Fojnon falĉis pene ;
 Falĉis patro, falĉis mi,
 Falĉis ambaŭ kune ni...*

La movado en Klermonto ankoraŭ ne estis tiel vigla kiel nun kun prof. Janton ĉe la Universitato, kaj krom mi estis nur unu SAT-ano, la jam maljuna Chavenon, eks-ĝendarmo kiu fariĝis anarkisto, bonega kamarado.

Estis ankaŭ kelkaj aktivaj gejunuloj, laboristoj kiel Vidal kaj studentoj en instruista lernejo. Al tiuj ĉi mi pruntedonis librojn, kiujn mi neniam revidis. Tiujn librojn, por mi perditajn, mi ne tro bedaŭras, esperante, ke ili trafis en bonajn esperantistajn manojn.

Iun sabaton en julio 1938, kun mia edzino kaj niaj du gefiloj, ni piediris al Charade super Royat, kaj ĉe rando de arbaro starigis nian tendon, sur kiu flirtis esperantista flageto. Vespere ni frue endormiĝis. Kiam ni frue eliris por ĝui la friskan matenruĝon, nin atendis surprizo : proksime de nia tendo staris alia kun sama flageto : tie alvenis nokte piedmigranta nederlanda familio. Ni kune pasigis la tutan dimanĉon en

* "Pola folkloro kaj Popolkanto".

la arbaro, kolektante fragojn kaj frambojn kaj agrable interparolante.

En 1940 la mobilizado vokis min al Nimo. En la sama taĉmento troviĝis esperantisto el Draginjano. Kun li mi kontaktiĝis kun lokaj samideanoj, kaj ni ambaŭ vizitis D-ron Salan, pri kiu mi ofte aŭdis en la periodo antaŭ kaj post la skismo en la laborista esperantistaro. Li ĝentile akceptis nin, tamen io nedifinebla havigis al ni la impreson, ke li ne tre deziras rilati kun esperantistoj. Fakte li tiam kabeis, kaj tio daŭris longe. Sed paciencu : ni retrovos lin*:

2. En 1941 mi laboris en vilaĝo apud Paŭo ĉe la firmo Turboméca, aviadmotora fabriko. Ĝis la fino de la milito mi tie estis sola esperantisto. Poste la firmomastro, juda poloj rifugiĝinta en Genevo, reveninte, tuj vojaĝis al Germanio, kie li kolektis aron da 160 scienculoj, teknikistoj, desegnistoj, ĉiuj fakuloj pri reaktoroj, kaj kunigis ilin en stud-oficejon ĉe Konstanca Lago.

Kelkajn monatojn poste tiu tuta kolegaro venis al la Pirenea montpiedo kaj kuniĝis kun ni. Mi karesis esperon, ke inter ili troviĝos esperantisto(j), sed - eĉ ne unu. Sed samtempe oni dungis kelkajn francajn kunlaborantojn, kaj per malprobabla bonŝanco, inter tiuj estis du SAT-anoj : k-doj Marchand, pariza alte kvalifikita laboristo, kaj Moreau**, desegnisto-projektisto, kiu lernis esperanton en Bruselo (ambaŭ lernis per la Racia Kurso por franclingvanoj "Cours Rationnel").

* Ĉ. IX, 4.

** Andreo Moreau anonime desegnis la titolbilon por la broŝuro de Simone Glodeau : "Une humanité, une langue".

Ni tuj grupigis kelkajn simpatiantojn, malfermis kurson en vilaĝo Bordes, kaj ek-rilatiĝis en Paŭo kun esperantistino : S-ino Rivière, maljuna, vidva, kripla sekve de fervoja akcidento, kaj grave kormalsana ; tamen viglasprita, vivoplena, fervora kaj larĝamensa. Tre dikredanta, katolika, ŝi en sia juneco militadis en feministaj asocioj kune kun judaj virinoj. Patriota, gaŭlista, ŝi ne timis amike rilati kun komunistoj, anarkistoj, sennaciistoj, ateistoj, se nur ili estas esperantistoj : por ŝi esperantismo estis kriterio pri bona homo - ŝi estis ne neŭtralista, sed vere neŭtrala, t.e. tolerema. Kune kun sia edzo, ŝi estis partopreninta en pluraj universalaj kongresoj de UEA.

Ni kune fondis grupon. Pro konsidero al S-ino Rivière kaj al pluraj gevarbitoj, kiel ŝi katolikaj, ni decidis, ke ĝi estos sendependa, kaj ĉiu membro aliĝos laŭplaĉe, ĉu al UEF*-UEA, ĉu al SAT, ĉu al iu alia, aŭ al neniu organizo. Ni oficiale titolis nian klubon : Grupo esperantista de Bas-Pireneoj**, ĉar ni jam havis membrojn en pluraj lokoj ; krom la ĉefurbo Paŭo, kaj la kerno en Bordes, en najbara vilaĝo Ousse estis esperantista paro veninta el Turo - ili fariĝis muelistoj kaj pastaĵ-fabrikantoj - kaj en alia pli malproksima loĝis fervorega emerito Dufau, eks-doganisto en Hindo-Ĉinio***. Iam, de tiu ĉi vokite, ni taĉmente biciklis al lia vilaĝo Arzacq por propaganda kunveno en la komunuma domo. Dank'al lia preparo venis sufiĉe multaj gevilaĝanoj, sed tiu relativa sukceso restis sen pozitiva sekvo.

* Union espérantiste de France et des Colonies, kiu en 1962 fariĝis UFE.

** Antaŭa nomo de la departemento, nun Pirene-Atlantiko.

*** Nun Vjetnamio, Kamboĝio kaj Laosio.

La titolo elektita por nia grupo havis alian signifon : montri nian intencon fondi filiojn en pluraj lokoj de la departemento, kaj ligi interrilatojn kun najbaraj departementoj kiel Landes, Gers, Alt-Pireneoj (en Tarbo kaj Lurdo ni eltrovis izolitajn samideanojn). Sed tiu plano evidentiĝis tro ambicia.

La franca radio organizis en multaj urboj dissendojn titolitajn : "Vi havas la parolvicon". Volontulaj amatoroj estis invitataj pritrakti antaŭ publiko libere elektitajn temojn. Mi enskribiĝis en Paŭo. Kiam alvenis la difinita vespero, kiel surprizita mi estis, vidante inter la tri aliaj parolontoj S-anon Dufau ! Sen antaŭa interkonsento, li kaj mi ekhavis la saman ideon. Li parolis unuavice, mi triavice. Ni ne gajnis la premion : ĝi estis juste atribuita al Paŭa okcitana kanzonisto, kiu verve pritraktis la regionan folkloron. Fama kaj aprecata en tuta Bearno, - profeto en sia lando -, li ricevis pli longan aplaudon ol ni, kaj tion meritis : ĉar li sin montris multe pli sperta en popola retoriko. Sed, tiun vesperon, la multopa ĉeestantaro en Paŭo kaj la multegopa aŭskultantaro en Franclingvio aŭdis du poresperantajn pledojn, feliĉe malsamajn : ili bone sin kompletigis reciproke. Praktika rezulto ? Ankoraŭfoje nula. Neniu ĉeestanto venis al ni post la kunsido, kaj, miascie, neniu aŭskultinto skribis al la Radio-ofico. Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas...

La postan jaron, 1947, mi forlasis la regionon, ne lasinte pluvivontan semon.

Tiun jaron en januaro mi eksciis pri la morto de Lanti per kortuŝa letero de la junaj geamikoj Andreo kaj Marcela*. Ĉe tiel konsterna

* Berte. Kio ili fariĝis ? Ĉu ili estas kabeantaj ?

novajo, kion diri ? Nur dolora silento povas esprimi mian senton.

3. Reirinte al mia naskiĝurbo Aleso, tridek jarojn forlasitan, mi tie trovis grupon vigle animatan de K-do Raynaud, kursgvidanto, kaj de S-ino Lanoux, prezidantino, kies du adoptitaj filinetoj flue parolis esperanton. La junaj klasanoj de K-do Raynaud, instruisto-adepto de la Freinet-metodo, intersangadis pere de esperantisian klasgazeton kun nederlandaj lernejoj.

En 1959 S-roj Llech-Walter kaj Gendre, el Perpinjano, venis por propaganda kunveno en la urba teatro. Krom la alesa esperantistaro ĉeestis sufiĉe multaj personoj. En tiu sama jaro la eminenta S-ano Lapenna, en propaganda vojaĝo tra Francio, vizitis naŭ urbojn en la teritorio de la Langvedok-Rusiljona Federacio de UFE. En Aleso li prelegis en salonego de la Komerca Ĉambro, en la eks-episkopa domo. La afiŝoj anoncis nur : "Prelego pri Jugoslavio", sen mencio pri esperanto. Sufiĉe multopa publiko mire aŭdis tiun belegan prelegon, kiun K-do Raynaud tradukis frazon post frazo por la franc-lingvanoj. La neesperantista aŭskultantaro, tre interesita, longe aplaudis. Tamen ankau tio ne venigis al la kurso eĉ unu plian lernanton. Cent semoj perdiĝas... vi ja konas la refrenon.

En 1951 Aleso akceptis la kongreson de la Federacio, prezidata de S-ro René Llech-Walter. Ĉe la malferma kunsido, miksite kun la kongresanoj, svarmo da neesperantistoj plenplenigis tiun saman salonegon, en kiu naskiĝis, preskaŭ 40 jarojn antaŭe, nia unua grupo l'Espero Alesa.

Por tiu solena malfermo mi havis la ĝojon elektigi kiel honorprezidanton mian karan instruiston, S-ron Lauze, preskaŭ okdekjara. Li kredis esti elektita kiel plejaga,

sed erare : la plej maljuna kongresano estis S-ro Escaré el Armissan (Aude). La plej junaj estis la du filinetoj de Ges-roj Lanoux.

Mi aŭte veturigis S-ron Lauze de Anduzo, lia naskiĝ-urbo, kie li emerite retirigis. Li malfermis la kunsidon per mallonga sprita parolado en franca lingvo, sed li rezervis al mi surprizon : el sia poŝo li eltiris karton, kaj mi kun emocio aŭdis lin laŭtlegi, kaj francen traduki ĝian tekston. Ĝi estis poŝtkarto, kiun mi estis al li sendinta 35 jarojn antaŭe, kiam li estis ĉe la militfronto. Per ĝi mi esprimis al li mian dankemon, kaj mian neelŝireblan esperon pri la estonteco de nia lingvo kaj de la "interna ideo".

Poste, antaŭ ol S-ro Llech-Walter komencos pri-trakti seriozajn temojn, mi diris esperante kelkajn salutvortojn al la gekongresanoj en la nomo de la grupo kaj de la urbo, "Ales-mundi", Aleso-monda. Antaŭ nelonge, Gary Davis, la mondcivitano, en triumfa propaganda vojaĝo, altiris al Nimo amason da simpatiantoj, kiuj lin akklamis. Multaj enskribigis por ricevi mondcivitanan karton (mi ankoraŭ tenas la mian kun esperanta teksto) ; multaj urboj, urbetoj, vilaĝoj en la departemento kiel en multaj aliaj, sin proklamis "mondanigitaj", kaj starigis sur ĉiuj strataj enirejoj la ĉielarkan panelon, simbolon de la "mondanigitaj komunumoj". Post tiu entuziasma ekflamo, la modo forpasis kiel pajlofajro. La insignoj paliĝis, velkis, fine malaperis. Mondcivitaneco sen komuna mondlingvo, ĉu ne utopio ? Kiam do la sin pretendantaj mondcivitanoj ekkomprenos, ke ili nepre bezonas lerni kaj praktiki esperanton ? Kiam la esperantistoj, kaj unuavice la SAT-anoj, naturaj mondcivitanoj, ekkomprenos, ke ili devas aliĝi al la mondcivitana movado, aktivi en ĝi, kaj enporti en ĝin la necesan ilon, kiun ili posedas ?

Dum la komuna tagmanĝo, mi hazarde sidis fronte al la avinjona fraŭlino, kies beleco faris al mi tiel fortan impreson, 37 jarojn antaŭe*. Kaj mi - mallerte, stulte senpripensa ! - parolis al ŝi pri tiu unua interrenkonto. Mi tuj - sed tro malfrue ! - ekkonsciis, ke ŝi ne tre ŝatis tiun rememorigon pri la jam malproksima tempo de ŝia juneco en floro. Tial, pro respekto al ŝia natura virina koketeco, mi ĉi tie ne nomos ŝin.

4. 1954. Nova sesmonata restado en la Pariza regiono. Mi kelkfoje vizitis la SAT-sidejon kaj la grupkunvenojn en la Laborborso. Tie mi renkontis kelkajn malnovajn fidelulojn, kaj ankaŭ novajn vizitaĝojn, ĝenerale junajn. La kunvenoj ne estis tiel tumultaj kiel en la 30-aj jaroj - kvankam iafoje pluraj malpaciencaj junuloj provis skui la aŭtoritaton de la malnov-gvardia PK**. Tiujn simpatiajn ikonoklastojn mi iam kromnomis "la junaj turkoj", ĉe kio ekridetis Bannier kaj Barthelmess.

En Montmartre R. Schwartz fondis novan kabareton, la "Tri Koboldoj". Tie, unu vesperon, mi kvazaŭ mirakle retroviĝis en la varma etoso de la iama Vonesch-bierejo. Rajmundo kantis faman francan kanzonon, "L'Edzino mortis!", kiun li esperantigis laŭ sia majstra maniero, kaj al kiu li aldonis pikan respondon de la edzino, kantatan de Marga. Kiel daŭre juna kaj viva restis tiu escepta paro, post trideko da jaroj !

Dum paŭzo, ĉe bierglaso, ni interparolis, kaj melankolie elvokis la memoron de la forpasintaj amikoj : Echard, Le Cornec,

* Vd. "...el la kara infaneco", ĉ. V, 8.

** Plenum-Komitato.

Solsona... Verdkata saùdado*... Mi tamen ne imagis, ke tio estas mia lasta persona renkonto kun nia amata kanzonisto kaj ĉefpirato, kiun mi revidos nur sur ekrano, kaj kies voĉon mi reaudos nur pere de sonfilmbendo**.

En la pli junaj generacioj nia kabaretestro eltrovis novajn talentojn : inter tiuj elstaris Flego : ankoraù unu "bona beko", kiu tamen ne naskiĝis ĉe Sejno-bordo !***

Surprizis min ankaù K-do Laurat, kiun antaùe mi neniam vidis, kaj kies nomon mi konis kiel tiun de sociologo kaj filozofo. Tiun vesperon, en tiu Montmartra kabareto, li laùtlegis plurajn elegiajn poemojn de li verkitaajn en perfekta versfarado.

Ĉu la Koboldoj estis la cigno-kanto de la "gaja muzo", sub kies signo Schwartz prezentis sian unuan kantaron ("Verdkata Testamento")? Ĉu post malapero de la neanstataùebla iniciatoro**** la fonto de la esperantista kabaretarto por eterne elĉerpigis ? Antaù nelonge en Parizo ekĝermis espero : per sia titolo mem la "Ruza Kruĉo" jam odoras ŝvarcan^x spicon*****; ĉu Jak Le Puil kaj G. Lagrange estos indaj heredantoj de la ŝvarca spirito ?

Iam mi vizitis la centran oficejon de UEF, kie deĵoris Huguette Royer. Mi konis ŝin jam de la tempo antaù la lasta milito, kiam ŝi estis tre juna knabino. Ni longe interparolis, elvokis niajn restadojn en Pireneoj. En Lurdo ŝi amike rilatis kun S-ino Le Bondidier, kuratorino de la urba kastelo-muzeo, kaj kun

* Alia neologismo vane proponita de Grosjean-Maupin, sed poste akceptita en PIV. Vd. "Glosaro".

** Vd. ĉ. VIII, 8.

*** Sardjan Flego estas Jugoslavo el Zagrebo.

**** R. Schwartz mortis 20 jarojn poste, 1974.

***** Aludo al la titolo de la postmorte eldonita verko de Schwartz : "Kun siaspeca spico".

Patrino Marie-Natalie de la Sankta Triunuo, monaĥino. Tiun ĉi mi neniam renkontis, sed mi sciis pri ŝia vigla esperantista aktiveco, kaj mi legis tekstojn de ŝiaj rimarkindaj prelegoj kaj propogandaj artikoloj (pri kiuj min rememorigas la same bonegaj tekstoj de K-do Masson). En 1952 ŝi majstre organizis tre sukcesan kongreson de la Tuluz- kaj Pirene-regiona federacio, kiu okazis en Lurda monaĥinejo. Sed poste ŝi estis sendita al alia monaĥina komunumo en Savojo, kaj ne plu disponis tiom da tempo dediĉebla al esperanto*.

Per Huguette mi iom pli eksciis pri ŝia neordinara personeco. Ŝi estis trege viva, gaja, senafekta, senceremonia. Al siaj amikinoj ŝi diris : "Ne alparolu min per "Révérènde Mère" (respektiginda Patrino), nomu min simple Natalia !"

5. Kiam mi revenis al Paŭo post sepjara for-esto, la iama grupo ne plu ekzistis. S-ino Rivière, tiel sprite vigla kiel antaŭe, tiel fervora, estis pli kaj pli malfortika kaj suferanta pro sia kormalsano. Mia edzino kaj mi ofte vizitis ŝin, kaj, kelkajn jarojn poste, lastafoje vidis ŝin en la kliniko, kie ŝi mortis. Kuzino ŝia, al kiu ŝi buŝe testamentis, donacis al mi komisie de ŝi ŝian tutan esperantan libraron.

Iam venis S-ro Ribot, diplomito pri altaj esperantaj studoj, konata kiel efika propagandisto kaj aktiva eldonisto de esperantaĵoj**. Katoliko kaj neŭtralistoj, li simpa-

* Naskita samjare kiel esperanto (1887) en St Dizier, "Patrino" Maria-Natalia fariĝis monaĥino en 1912 ; profesoro en Paris-Lübeck de 1918 ĝis 1927 ; ĉefa esperantista aktiveco dum ŝia restado en Lurdo ; poste la religia hierarkio sendis ŝin (ĉu eble purgatorie ?) en Savojan monaĥinejon, kie ŝi disponis pri malpli da tempo dediĉebla al esperanto ; fine migris al Montpeliero, kie ŝi mortis, 1966.

** Editions françaises d'Espéranto, en Marmande.

tiis kun mi, kaj li konfesis al S-ino Rivière, ke li ne komprenas, kiel mi povas esti SAT-ano. Al kio ŝi respondis, ke jam kun pluraj SAT-anoj kaj ateistoj ŝi havis agrablajn, eĉ amikajn rilatojn.

Li venis speciale por propagandaj prelegoj en liceoj kaj porinstruistaj lernejoj. Multaj geinstruistoj kaj gelernantoj aŭskultis kun atento kaj intereso. Sed ne sekvis (almenaŭ tuj konstatebla) rezulto.

S-ro Ribot kaj mi ricevis inviton por vespermanĝo ĉe la burĝa Rotari-klubo. Ankaŭ tie ni estis aŭskultataj kun intereso. Tiuj sinjoroj ne nur ĝentile kaj afable nin akceptis - kaj regalis - sed ankaŭ sin turnis al ni kun multaj sagacaj demandoj. Favore impresis ilin la nomoj de S-roj Warnier kaj Baudet*, konataj parizaj rotari-anoj. Sed finfine, kiu sekvo? Verŝajne nula. Cent semoj perdiĝas...**

Iam S-ino Rivière, kiu ĉiam estis delegitino de UEA, ricevis leteron de pola esperantisto. Tiu samideano, tre malsana, sciante ke Paŭo situas proksime de Lurdo, petis, ke ŝi sendu al li botelon da akvo el la mondfama mirakla fonto. Ŝi komisiis min por prizorgi la aferon. Kvankam ŝi sciis min nekredanto, ŝi plene fidis min. Kaj prave: mi skrupule plenumis la komision, mem ĉerpis akvon el la fonto, kaj sendis la botelon. La adresito danke kvitancis pri la ricevo, sed poste ne venis pluaj novaĵoj. Kredeble li mortis malgraŭ la mirakla akvo, sed almenaŭ ni subtenis lin per espero en la lastaj tagoj de lia vivo.

* Pri S-ro Warnier: ĉ. VI, 2. Pri S-ro Baudet, same.

** En 1979 mi legis specialan numeron de la luksa Rotari-revuo, grandparte kaj tre favore dediĉita al esperanto. (kompreneble sen rilato kun nia semoprovo en Paŭo).

En Turboméca-firmo ne estis plu k-doĵ Moreau kaj Marchand. Sed mi trovis tie novan samideanon, inĝenieron Prat, eks-lernanton de la koresponda kurso de S-ro Delaire. Lia edzino kaj kunlernantino gajnis premie vojaĝon al Nederlando.

Novaj provoj, novaj fiaskoj. Enoficigite en la gvidposteno de teknik-komerca fako, mi dissendis cirkuleron al ĉiuj eksterlandaj korespondantoj de la firmo: "Bonvolu redakti viajn leterojn al ni en franca lingvo aŭ en esperanto." Ĉiuj respondis nur france. Interne de la firmo, Prat kaj mi, konsciaj pri la neefikeco de rekta propagando, provis uzi oblikvan vojon. Ĝuante estimon de la laboristaro, ni fondis esperanto-fakon en la kadro de la kultur-sekcio de la entrepren-komitato. En la nomo de tiu komitato ni komencis korespondadon kun alilandaj gelaboristoj en Jugoslavio, en Hungario, en Britio, kun nederlandaj sindikatanoj, kiuj publikigis informbultenon en esperanto. La laboristoj rigardis kun scivolemo la poŝtkartojn el fremdaj landoj, kiujn ni prempinglis sur la panelo rezervita por afiŝoj kaj komunikaĵoj de la entrepren-komitato, kaj niaj kolegoj komitatanoj estis interesitaj per niaj raportoj pri la inform-interŝanĝoj. Sed al neniu venis la ideo, ke ili povus lerni la lingvon por mem uzi ĝin utile al siaj klas-celoj: ili havis du specialigitajn kolegojn, kiuj prizorgas la aferon, tio sufiĉis al ili.

Meti esperanton je la servo al la laborista klaso: bela formulo, kiu difinas nepre alstrebindan celon. Sed por efike servi, necesas esti sufiĉe forta - kaj ni estas ankoraŭ malfortaj. Jen estas magia erarcirklo, en kiu ni rondiras enfermite, kaj ne kapablas trovi eliran tangaŝanton. Por disrompi la ĉirkaŭmuron de ĝenerala indiferenteco plu necesos longaj klopodadoj kaj penoj, tiel en la por-kiel en la per-esperanta laboro.

Kelkan tempon poste venis kontisto Daniel Poirier, SAT-ano. La antaŭan jaron, kiam li loĝis en Venezuelo, mi korespondis kun li kaj ricevis de li abonon por Geografa Revuo, kiun mi peris por franclingvanoj : la mondo estas ja malvasta por ni esperantistoj.

Tiu Geografa Revuo, bedaŭrinde efemera, havigis al mi okazojn por korespondi kun ĝia fondinto, la esploristo Tibor Sekelj ; kun Marinko Givoje, kiu poste fariĝis membro de nia Literatura Komitato ; kun S-ano Robert Gérard, instruisto pri geografio en Parizo ; kun S-ro G. Melo, S-ro Auguste Broise, S-ro Micard kaj pluraj aliaj en Francio ; kun A.W. Thomson (Avoto) en Britio, S-ro Manuel Gomès en Acoroj, S-ro Von der Ley en Germanio kaj kun S-ino Dragoni en Torino.

Tiun ĉi mi vizitis okaze de profesia vojaĝo en Italio : bela kaj sprita, perfekta esperantistino ; konversacio kun ŝi estas rara plezuro. En tiu sama vojaĝo mi vizitis ankaŭ k-don Quarone en Milano. Li konatigis min kun S-ro La Pila, tre afabla neŭtralulo loĝanta en la sama domo. Nun Quarone malaperis. En la jarlibro restas nur la nomo de lia vidvino.

En Vaskolando loĝis tiam du samideanoj : unu en vilaĝo apud Hendaye, pliguste balbutanta esperantano, kaj unu bonega esperanto-praktikanto, Pelletier, en Saint-Jean-de-Luz. Tiu ĉi estis tre originala kaj simpatia viro, parizano. Tamen mi ne renkontis lin en la folaj jaroj, kiam li rilatis kun geartistoj kaj estis amiko de Joséphine Baker.

En 1936-37 li partoprenis la hispanan militon kiel aviadista kapitano en la internaciaj brigadoj. Nun li vendis bonegajn fajr-estingilojn. Tiu komerca aktiveco ofte venigis lin al Paŭo, kie li vizitis S-inon Rivière kaj min, kaj ni havis longajn interesajn interparoladojn. Rimarkinte, ke esperanto ankoraŭ

ne penetris en Afrikon, li kovis projekton iri mem propagandi en tiu kontinento, uzante la influon de la progresemaj regantoj de iuj novaj ŝtatoj : li komencas per Gvineo kun prezidento Seku Ture. Bedaŭrinde li frue mortis pro gorgo-kancero (li fumis tre multajn cigaredojn).

Aparte plezuriga vizito al ni estis tiu de gek-doĵ Dazun, kiujn mi konis en Parizo. Ili pasis okaze de vojaĝo al Maseube, kie ili nun loĝas. En la konversacio ni eltrovis, ke en 1940 nia filino, en Alesa liceo*, estis lernantino de fraŭlina instruistino, kiu estis la estonta Dazunino. Mi jam notis : malvasta estas la mondo, des pli malvasta Francio.

6. En 1957 mi pasigis unu tagon ĉe la UEA-kongreso en Marsejlo. Ĉiuj urbaj aŭtobusoj estis ornamitaj per du esperantaj flagetoj. Estis belega somertago. La kongreso okazis grandparte en libera aero sur la vasta Borély-parko. Tie mi vidis nian karmemoran Caubel kun lia familio, tie mi renkontiĝis kun Marga Schwartz, ĉiama plezuro, sed, ho ve ! ne povis trafi Rajmondon. Mi bedaŭras ankaŭ, ke mi maltrafis S-anon Bourdelon, kiu tamen estis tiam - kaj kredeble plu estas Marsejlano.

Tie mi konatiĝis kun G. Waringhien. Li sciis, ke mi komencis kolekti geografiajn kaj historiajn nomojn esperantigitajn de Zamenhof kaj de diversaj aŭtoroj, kaj surslipigi ilin cele al preparo de kompleta propranoma vortaro. Kaj li diris al mi : "Mi batos vin !". Efektive, kelkan tempon poste aperis lia Grand Dictionnaire Esperanto-Français, poste PIV, kun sufiĉe multe da

* Dum mi estis mobilizita mia familio forlasis Klermonton kaj loĝis ĉe mia patro en Aleso.

propraj nomoj, tiel ke mia tro ambicia projekto perdis sian ĉefan intereson.

Vespere, ĝis malfrue en la nokto, la kongresanoj sidis sur vasta teraso ĉirkaŭ malgrandaj tabloj, trinkante kaj babilante. S-ro Von der Ley diris al mi : "Ĉu vi konas S-inon Comebias ? Nu, Paŭo situas proksime de Dakso, kie Ŝi loĝas : se mi estus Valo, mi nepre volus viziti Ŝin." Tio ekscitis mian scivolemon. Kelkan tempon poste mi sekvis la konsilon, kaj trovis ĝin bonega. K-dino Simone Comebias, SAT-anino kaj dumviva membro de UEA, estas viva, sprita, gaja persono. Al Ŝi ne mankas humuro : Ŝi iam kromnomis min Karna Valo ! Ŝia konversacio estas interesa kaj agrabla. Ankaŭ tiu de Ŝia edzo, malpli esperantisto-militanto, sed pasia kaj kompetenta bredisto de abeloj. Ili ofte transloĝigis : mi revidis ilin en najbara urbo Mont-de-Marsan, sed poste ilia adreso estis en Metz, kaj nun en Biarritz. Bedaŭrinde mi nun loĝas for de ĉiuj tiuj urboj.

En tiu sama nokto, iom poste, mi sidis ĉe alia tablo kun la prezidanto de UEA, S-ro Canuto, dekanano de la medicina fakultato en Parmo. Ni interparolis. Li pridiskutis mian opinion favoran al esperantigo de propraj nomoj, kiun li legis en Sennacieca Revuo 1952. Li tute ne konsentis, ne nur pri familiaj, sed eĉ pri personaj voknomoj (baptonomoj). "Mi ne estas Georgo, li ekkriis, mi estas Giorgio !"

Tiu artikolo havigis al mi ankaŭ perleteran diskutadon kun M.C. Butler, tiama prezidanto de la Akademio : tiu ĉi obstine rifuzadis la landnomojn kun -io. Nur post lia morto, la Akademio sub influo de Waringhien akceptis tiun formon jam longe adoptitan en la praktiko.

7. 1961. Faŭlhaber, malsana, devis rezigni sian postenon kiel sekretario de la Literatura Komitato, fondita de li kun Degenkamp en la

kadro de FLE* kaj poste fariĝinta SAT-instanco. En tiu posteno, kiun li majstre tenadis dum kvaronjarcento, la PK petis, ke mi lin anstataŭu. Komence mi rifuzis, konsciante pri mia nesufiĉa kapableco ; fine mi cedis al amikeca insisto de Barthelmess, kaj konsentis preni sur min tiun timigan ŝarĝon. Nun mi tion ne bedaŭras : ĝi almenaŭ havigis al mi okazon por tre agrabla korespondado kun mia karmemora antaŭulo, kiu pluvisis multajn jarojn da suferado, kaj kiun bedaŭrinde mi neniam renkontis. Ĝi havigis al mi ankaŭ la plezuron korespondi kun S-ro Friis (Dansk Esperanto-Forlag), kun k-do Waringhien, k-dino Dazzini, k-doĵ Aarse, Givoje jam nomita, Miyamoto masao, Konisi gaku, Edv. Ockey, Garrote, J.v.Scheepen, kaj kun kelkaj aŭtoroj, kiel la bedaŭrata Paul Lobut, Ib Schleicher, Kris Long, Zora Heide, Gudrun Riisberg, Heide Apolloner, Johan Hammond Rosbach, P. du Cheyron, Barkoviĉ, Leif Gunnar Karlsson, kc.

8. 1964. SAT-kongreso en Narbono, tre bone organizita de la loka OKK** ĉirkaŭ k-do Loubic***.

En la malferma kunsido, jen surprizo : S-ro Llech-Walter, tiam prezidanto de UFE, supreniras la podion por saluti la kongreson. Nu ! al tiu sinjoro ne mankas kuraĝo kaj aplombo : ja ni, malnovaj SAT-anoj, ankoraŭ ne forgesis lian konduton kontraŭ ni antaŭ dudeko da jaroj. Tamen la maljuna gvardio donis la signalon de aplaŭdo, kiam li finis sian paroladeton per la vortoj : "Vivu Esperanto ! Vivu Zamenhof !"

* "Fidu la Estontecon", nomo de la Flandra (Nederlanda) LEA. (aŭ : "Federacio de Laboristaj Esperantistoj" en nederlandlingvaj regionoj).

** Organiza Kongres-Komitato.

*** Paul Loubic mortis, ankoraŭ juna, kelkajn jarojn poste.

En tiu kongreso mi retrovis kun plezuro geamikojn Piron, Glodinon (ho ve! Glodo mortis 11 jarojn antaŭe), Barthelmess, kaj la ekŝparizaninon Deniza, kiu fariĝis edzino de la afabla Castelló en Béziers.

En distra vespero juna novevarbita kun bel-ega tenorvoĉo kantis en esperanto la mondfaman "Sankta Luĉio". Barthelmess pianoludis adaĝon de sia amata Betoveno, kiun ni ĉiam kun ravo aŭskultas.

Poste ni spektis unu el la unuaj parolfilmoj tutaj en esperanto* : "Angoroj" de S-ano J.L. Mahé, kun muziko de René Texier. Ĉefaktoroj : Flego, Jana Ravselj, Marc Darnault. R.Schwartz tenis epizodan rolon de polic-komisaro. G. Waringhien pruntedonis sian voĉon por la prezenta parolado. La filmo estis unuafoje projekciita en Parizo la 16an de majo 1964 en la kadro de la 56a kongreso de UFE.

Inter la figurantoj, krom R. Bernard, mi jam konis Jean Thierry. Dum kelkaj jaroj li tenis hotelon en la centro de Parizo. Tie mi gastis ĉiufoje, kiam mi profesie vojaĝis al la ĉefurbo ; plurfoje mi renkontis eksterlandajn esperantistojn inter la samtempaj gastoj. Kun ili kaj kun li, la hotelmastro, ofte ni agrable interbabilis.

En la daŭro de la Narbona kongreso la franc-lingvaj SAT-anoj plurfoje kunvenis aparte por preparoli gravan projekton : nome la reeldonon de "Cours Rationnel" rebakita en pli moderna formo. Pri tio mi longe rakontos en la venonta ĉapitro.

9. 1965, lasta jaro de mia profesia aktiveco. En septembro lastafoje mi vojaĝis al Torino en la kadro de industria kunlaborado inter Turboméca kaj la aviada fako de la giganta firma FIAT. En ties komerca servo laboris

* Oni scias, ke en "la Diktatoro" de Karlo Chaplin, la butikaj surskriboj estas ĉiuj en esperanto.

S-ro Grattapaglia, vigla animanto de la loka esperantista grupo. Li kreis en la firmo specialan esperanto-fakon, kiu eldonis prospektojn kaj reklamkartojn en nia lingvo.

Vespere mi eniris en la vastan, belan salonon de la Torina esperanto-klubo (neŭtrala) dum Grattapaglia raportis pri la universala kongreso de UEA en Tokio. Pitoreskaj priskriboj, ekzotaj detaloj, vervaj rakontoj pri tiu tre sukcesa kongreso kaptis kaj tenis la atenton de la aŭskultantaro, sufiĉe multopa.

Poste mi estis petita, kiel fremda gasto, diri kelkajn vortojn. Dum mi parolis, la funda pordo malfermiĝis, kaj mi vidis alveni S-inon Chiare Dragoni. Post la kunsido, honore al mi, ŝi invitis al sia hejmo ĉiujn, kiuj deziris plu resti kun ni.

De sur ŝia teraso ni ĝuis belegan vidon super la lumbrila urbo sub la stelplena ĉielo. Tie pasis horoj en agrabla babilado (sen krokodilaĵoj) kun pluraj samideaninoj, ĉiuj egale ĉarmaj. Unu juna fraŭlino alparolis min: "Mi aŭdis, ke baldaŭ vi loĝos en Nimo. Tie nun loĝas ankaŭ mia frato Roberto Frus, kiu laboras en presejo kiel tipografo-kompostisto, kaj edziĝis kun franca instruistino". Malvasta Esperantio!

Kiam fine mi retroviĝis en mia hotelo, aŭte rekondukite de nia tiel afabla gastigantino, restis al mi nur tempo por duŝo antaŭ rapida iro al la aerstacio, de kie frumatene mi devis flugveturi al Parizo.

En tiu tempo, krom eraro, SAT havis peranton en Torino*. Mi konfesas, ke mi ne trovis tempon por viziti lin, kaj tion mi bedaŭras...

- Mensoganto! hipokritulo!... Nu, kiuj

* Strange, ke tiel grava industria urbo, kun batalema laboristaro, ne figuras en nia lasta jarlibro.

estas sentemaj al la ĉarmo de virina amikeco,
tiuj indulgos kaj pardonos min.

Kelkajn tagojn poste, lasta profesia vojaĝo
kondukis min al Stutgarto*. Ankaŭ tie, sed pro
trudaj taskoj, mi ne povis trovi tempon por
konatiĝi kun mia kolego kaj SAT-kamarado,
ingeniero von der Heid.

Kaj mi, sesdekkvin-jara, emeritiĝis.

* La urbo, en kiu loĝis antaŭ 1914 mia korespondanto
Oskar Ziegler. Vd. "Kontraŭflue", ĉ. V, 10.

IX. Emerito.

1. Por esperantisto, la templiberala emeriteco estas bona cirkonstanco favora al plintensigo de por- kaj peresperanta aktiveco.

Jam en Narbono, antaŭvide pri mia baldaŭa pensiuliĝo, mi ricevis taskon en la afero pri "Cours Rationnel", reeldonota en reviziita modernigita formo. La tempo pli preciziĝis en la SAT-Amikara kongreso 1968 en Tuluzo.

La bildoj estos redeseignitaj de Petro Louis en pli moderna stilo. La tekstojn revizios Caubel, Grandière, Lagrange, Lentaigne, Levreaud kaj mi, kun laŭbezona peto pri konsiloj de la eminenta kompetenta Baronnet. Ni faru kiel eble plej malmultajn ŝanĝojn, ĉar jam la unua eldono evidentiĝis bonega. Mi estis komisiita por ricevi, kunordigi kaj harmoniigi la diversajn kontribuojn, kaj doni al la tuto definitivan formon.

Facila tasko, mi opiniis : Glodino sendos al mi po unu ekzemplero de ĉiuj sinsekvaj eldonoj kaj de la FEP-versio, en kiu eble ni trovos adoptindajn novaĵojn ; mi bezonos nur detondi paĝopartojn kaj glui ilin sur papero, plume intermetante ŝanĝojn, korektojn, aldonojn... Facile ja... Naiva iluzio ! Kiel malsingardeme mi akceptis tiun ŝanĝon ! En kiun vesponeston mi enŝovis fingron !

Komenciĝis daŭra interŝanĝado de korespondaĵoj trastroke inter la ses anguloj de la heksagono*. En ĉiu paĝo, ĉiu proponis plurajn ŝanĝojn, plibonigojn, ĝenerale plene pravigitajn, kaj baldaŭ drastajn traskuojn en la ordo kaj eĉ en la konsisto de kelkaj

* Francio, kies mapo enskribiĝas en tiu geometria figuro.

ĉapitroj. Pri multaj tiklaj punktoj necesis pluraj ir-revenaj diskutadoj. Ĉio estis krite ekzamenita kvazaŭ per lupeo, rebakita, re prilaborita, polurita... dum sep jaroj !

Remo Magnani estis komisiita por tajpi la prespretan manuskripton. Kompatinda Remo ! Kiam oni vidas la belan, klaran, agrablan kompostadon de la libro, oni ne povus imagi, al kiu hirta haoso li estis alfrontita : forstrekoj, interliniaj kaj margenaj aldonoj, translokigoj, kabalaj signoj, indikoj pri litertipoj, pri kompost-arangoj, kaprompa interŝovado de aldonaj paĝoj numeritaj per "bis, ter, quater", aŭ per literoj, kaj fine, kelkafoje, la paĝnumeroj ne normale sin sekvis... "Kia kaĉo !" prave ekkriis Magnani. Tamen oni povas nun konstati, kiel bonege li plenumis sian taskon.

Nia "Nouveau Cours Rationnel et Complet d'Esperanto" * aperis en 1973.

2. Liberigite el tiu truda laboro, mi restis ŝargita nur de mia funkcio kiel sekretario de la Literatura Komitato. Ĝi konsistas precipe el kontrolado de manuskriptoj : ne tre peza ŝarĝo, ĉar ĉiujare mi plendas, ke aŭtoroj kaj eldonistoj ne sufiĉe uzas nian helpon.

Do restis al mi libertempo. Mi komencis okupiĝi pri tradukoj. La unua estis elfrancigo de "La Kvina Evangelio" de Han Riner. Tiu traduko havas historion, kiun mi parte transskribas en mia antaŭparolo.

Mi tradukis ĝin unue en la jaroj 1930-1935. Han Riner estis eklerninta esperanton**, sufiĉe por almenaŭ ĝin legoscii. Foliumentemian unuan provtekston, li bonvolis diri kaj

* Nova Racia kaj Kompleta Kurso pri Esperanto, eld. SAT-Amikaro.

** Laŭ Borsboom (Vivo de Lanti), Han Riner, instigite de Lanti, reeklernis esperanton mallonge antaŭ sia morto (januaro 1938).

skribi al mi, ke li trovas ĝin "fidela kaj supla", kaj afable permesis eventualan publikigon de mia traduko.

Lanti kaj Rofo*, amikoj de Han Riner, opiniis tiun publikigon nepre dezirinda. Mi donis al Lanti mian manuskripton, kun ekzemplero de la franca originalo. Li kunprenis ĝin en sia ĉirkaŭtera vojaĝo, dum kiu li ĝin plene tralegis, komparis frazon post frazo kun la originalo, alnotis altvalorajn komentojn, sugestojn kaj konsilojn, kaj resendis. Post korektado mi submetis la manuskripton al la kontrolo de la Literatura Komitato, kaj proponis ĝin al la PK por publikigo kiel SAT-eldono. Sed tiu ĉi, pro financaj malfacilaĵoj, devis rezigni.

Dum la milito tiu manuskripto, sur kiu restis marginaj manskriboj de Lanti, estis perdita. Ne grave ! mi konservis en memoro ĉiujn kritikojn kaj konsilojn. Mi rebakis la tradukon, penante ankoraŭ pli supligi ĝin, parte per enkonduko de kelkaj neologismoj intertempe akceptitaj en PV-suplemento aŭ en PIV. Finfine, dank'al la senlaca sindonemo de Kribo kaj al afabla helpo de k-dino Germaine Roux, ankaŭ granda admirantino de la Rinera penso, ĝi aperis kiel suplemento de La Juna Penso (broŝurservo de SAT).

Poste mi tradukis aliajn verkojn de Han Riner, ankaŭ publikigitajn de la broŝurservo de SAT : "Individuista Manlibreto", "Individuismo en Antikveco", "La Inĝenia Hidalgo Miguel Cervantes" kaj "La Aperoĵoj de Ahasvero". Mi plie tradukis kaj same publikigis broŝuron de juna amiko mia, Pierre de Cazenove, pri "La Migrantoj en Francio nuntempe".

Poste mi riskis la danĝeran provon de originala verkaĵo : sin sekvis "...el la kara infaneco" kaj "Kontraŭflue". Jen estas nun la tria provo, kaj probable ĝi restos

* Richard Francisko, mortinta en 1974.

la lasta originalo de mi, eĉ se mi ankoraŭ longe vivus - kio estas pli ol necerta. Mi ja havas nenion pli por rakonti, kaj mi tute ne sentas min dotita per imagopovo kaj talento por konstrui romanojn aŭ novelojn. Eble, se restos al mi iom da tempo, mi prilaboros alia(j)n traduko(j)n. Mia nuna drolotata tasko estas esperantigo de "La Poemo de Rodano" de Frederiko Mistral, el la provenclingva originalo.

3. En la unuaj jaroj de emerita vivo, mia edzino kaj mi, ankoraŭ ne tro maljunaj, profitis de miaj jam ne limitaj libertempoj por libere vojaĝi tra mediteraneaj landoj en printempo, kiam ankoraŭ ne svarmas la turistaj hordoj.

En Florenco, 1967, ni kontaktis k-dinon Brogioni, kiu tre afable nin akceptis. Kun ŝi ni promenis en la fama apuda urbeto Fiesole kaj en la granda urbo, tiel riĉa je historiaj kaj artaj atestaĵoj el Mezepoko kaj Renesanco. Sur la placo de l'Duomo (katedralo) ni renkontis la prezidantaron de la neŭtrala grupo. K-dino Brogioni nin prezentis, kaj tiu sinjorino tuj invitis nin ĉeesti en la venonta grupkunveno. Bedaŭrinde ni estis forirontaj antaŭ la dato de la kunveno, kaj estis jam tro malfrue por ŝanĝi tiun daton favore al ni.

En Ateno, 1970, ŝajne estis neniu SAT-ano : tio estis en la periodo de la kolonela diktaturo ; tamen la neŭtralaj esperantistoj ne estis persekutataj. Mi vizitis en lia hejmo la delegiton de UEA. Dum ni interparolis, lia edzino regalis min per teo kaj kuko, sed ili ĝentile pardonpetis, ke ili ne partoprenas : ili estis fastantaj, ĉar tio estis en la "sankta semajno", antaŭ la ortodoksa Pasko. Poste la delegito venis al la hotelo por konatiĝi kun mia edzino, kaj pro la sama motivo li rifuzis ĉion, krom glaso da akvo. Ŝajnas,

ke la religiaj ritoj restis pli severaj en tiu lando ol nun en la romkatolikaj.

Tiuj afablaj samideanoj helpis nin per utilaj informoj. Kiam, vojaĝante eksterlande, oni akiras ian sperton pri la oportuneco de la franca lingvo, "ĉie komprenata", kaj eĉ de la angla, "universala interkomprenilo", oni des pli aprecas esperanton.

4. En Nimo mi trovis Esperantistan Kultur-Rondon, ne tre multmembra, sed vigla dank'al senlaca sindonemo de gek-doĵ Volpelière. Mi konis ilin de antaŭ 15 jaroj, kiam ni interrenkontis ĉe la propaganda kunveno de la mondcivitana pioniro Gary Davis. De tiam ili militadas por akceli kunligiĝon de mondcivitaneco kaj esperanto. Al sennaciulo kiel mi tio ŝajnas tute natura afero - tamen ĝi evidentiĝas malfacile realigebla : multaj, kun ĝustaj ideoj, ne kapablas transiri de teorio al praktiko. Eĉ en SAT malmultaj aliĝas al mondcivitana movado, kaj inter la registritaj "mondcivitanoj" malmultaj lernas esperanton. Sed niaj ambaŭ geamikoj ne mal-kuragiĝas.

Dume k-dino Volpelière ĉiujare gvidas kursojn por komencantoj kaj progresantoj, kun malmultaj lernantoj, sed ĝenerale kun sukceso. Ŝi uzas originalan metodon de ŝi mem elpensitan, kiu sin montras efika.

Ge-Volpelière ofte invitas kaj gastigas esperantistojn el diversaj landoj, Japanio, Jugoslavio, Ĉeĥoslovakio, Nederlando, Polio k.a., migrantaj tra Francio por helpi la esperantistan propagandon. Krom daŭra animado de la Kultur-Rondo, ili organizas ekspoziciojn, regionajn kongresojn, ktp, ĉiam sindonante al la afero.

Ankaŭ k-do Puechagut, malnova SAT-ano, estas ĉiam sindonema, sed bedaŭrinde lia sanstato ofte trudas lin al reduktita aktiveco, kiu kontrastas kun lia impeta naturo.

Ni konatiĝis kun la juna Torinano Roberto Frus, lia franca edzino kaj iliaj du infanoj. Frus kiel presisto eldonas belaspektan revu-eton "SudfranciaStelo", organo de la UFE-Federacio Langvedok-Rusiljono. Tiel la nima klubo estas formale ligita kun tiu neŭtrala organizo, sed la membroj libere aliĝas ĉu al UFE, ĉu al SAT-Amikaro, ĉu al ambaŭ - aŭ al neniu. Kvankam kelkaj SAT-anoj malaprobas tiun kunlaboradon kun neŭtraluloj ekster la strikte lingva tereno, mi opinias, ke en malgrandaj aŭ mezgrandaj urboj, krom esceptoj*, ĝi estas valida formo de por- kaj peresperanta agado. Ni iafaje estu oportunistoj, kaj memoru la artikolon de Lanti, kiu siatempe kaŭzis ian bruon: "Vivu la neŭtralismo!" Ĝi estis tiel prava, en la tiamaj cirkonstancoj, kiel en sia tempo la senkompromisa: "For la neŭtralismo!"

Iam Roberto Frus aranĝis renkonton kun Torinaj samideanoj en Gapo, urbo situanta proksimume ĉe la mezpunkto inter Torino kaj Nimo. Tio estis por mi okazo de persona konatiĝo kun K-do Colney, pri kiu mi ofte aŭdis. Malgraŭ la doloro kaŭzita de la freŝdata morto de filo, li mem bone aranĝis la kunvenon kaj salutis la ĉeestantaron sen montri afliktitan vizaĝon.

El Torino venis ges-roj Grattapaglia kun sia juna filo. S-ino Grattapaglia, altstatura kiel sia edzo, estas bela blonda germanino. Ĉirkaŭ ili, pluraj dekoj da Torinanoj, vigle parolantaj, kaj precipe junuloj kun gitaroj, kiuj multe ludis kaj kantis esperantajjn kantojn. Tre viva, juneca etoso - pli dank'al la nordaj italoj ol al la sudaj francoj.

* Ekzemple: grandaj industriaj centroj, urboj kun vigla aktiveco de sindikatoj aŭ/kaj maldekstraj politikaj partioj, urboj kun jam multopa esperantistaro.

Venis la patrino de Roberto kaj lia onklo. Lia fratino estis tiam en Nederlando, kie ŝi oficis kiel sekretariino ĉe la sidejo de UEA. Kelkan tempon poste ŝi edziniĝis kun angla samideano. Ili loĝas nun en Londono. De tie esperantaj anonkartoj sinsekve informis nin pri feliĉa naskiĝo de du infanoj de tiu juna paro, internacia kiel tiuj de Roberto kaj de Grattapaglia. Ŝajnas, ke Torino tenas rekordon tiurilate.

Nun la familio Grattapaglia vivas en Brazilio, kaj partoprenas en la tiea esperantista movado. Mi aŭdis antaŭ nelonge, ke de post ilia foriro la aktiveco en Torino iomete lamas. Kiom da grupoj, eĉ multopaj kaj ŝajne memstare fortaj, falas en letargion, tuj kiam mankas la ĉef-animantoj !

En Nimo, 1979, ekfunkciis nova aktiveco : perfektiga kurso en la Kulturcentro Pablo Neruda. Ĝin sekvas diligente kelkaj bone progresantaj lernantinoj, el kiuj pluraj jam partoprenis kongresojn, aŭ restadojn en Grezijono*. La kurso estas solide strukturita, kun partoj gramatika, vortara, de- kaj al-tradukoj kaj parola praktikado. Ĝin majstre gvidas D-ro Šalan.

Tiu ĉi post 35-jara kabeado subite reekaperis en la movado. Li venis kun libro, "La Nuda Vero"**, kiu estas atesto sopra, sen literatura pretendo - des pli efika kaj efika - pri vivo kaj morto en hitleraj ekstermejoj. Eble parte al sia kuracista profesio la aŭtoro ŝuldas la fakton, ke li vivanta eliris el tiu infero.

De post lia reenigo en la movadon, D-ro

* Kastelo kaj bieno, en kiu ĉiusomere diverslandaj gastoj perfektigas per lingva praktikado.

** Eldonita de la aŭtoro mem.

Salan elvolvas intensan aktivecon, kvazaŭ li volus kompensi la perditajn jarojn. Krom la perfektiga kurso (tri horojn ĉiusemajne plus la necesa preparado), li superrigardas kiel ĉefredaktisto la "Sudfrancia Stelo"-n, multe legas, trapasis en la daŭro de kelkaj monatoj la kvar unuagradajn ekzamenojn de la Franca Instituto por Esperanto - por li simpla formal-aĵo - kaj mi vidas lin matura por la plej supera*. Dume, mi scias, ke li laboras por gravaj traduktaskoj, el kiuj du estas jam eldonpretaj.

Salan diras : "Mi estis eksigita el SAT kiel komunisto, kaj el la komunista partio kiel esperantisto." Nun li estas neŭtrala, kvankam li ne tre ŝatas la "neŭtralecon" de S-roj Tonkin kaj K-io.

En Nimo la proksimeco havigas al ni okazojn por renkonto kun esperantistoj el la suda regiono : el Aleso gek-doj Raynaud, kaj el la najbara vilaĝo Cendras K-do Pelletier, aktiva en la fervojista medio ; el vilaĝo proksime de Nimo k-do Dalgon, abelbredisto, amiko de Poirier, kiun li konis en Venezuelo ; el Montpellier k-do Lentaigne kaj D-ino Vierne, kiun ni konis kiel lernantinon en Aleso, en la tempo de S-ino Lanoux ; el Perpinjano René Llech-Walter kaj J. Amoureux, erudicia pri historio de la esperanta movado, kiu posedas riĉan kolekton da esperantaĵoj, ktp.

En Tuluzo, kie loĝis mia filino, mi kelkfoje vizitis kunvenojn de la laborista grupo. En tiu urbo, antaŭ multaj jaroj, tuj post la dua mondmilito, mi rilatis kun tiam tre aktiva esperantisto, S-ano Lafon (kiu ŝajne nun kabe-as). Iam, kun lia unua edzino, juna blonda estonino kaj bona esperantistino, mi havis longan diskutadon pri internaciismo kaj sennaciismo. Ŝi diris : - La ekzisto de nacioj estas

* Atesto pri altaj esperantaj studoj.

fakto, kiun ni ne povas nei, kaj ni devas kalkuli kun ĝi. - Bedaŭrinda fakto, mi respondis : almenaŭ ni, esperanton praktikantaj, povas kaj devas ignori ĝin. Ni strebu kutimi ĝi al eksternacia pens-, sent- kaj agadkapablo, kaj ni celkonscie laboru por prepari sennacian mondon.

Dum ni pasie argumentadis, Lafon mute aŭskultis, kvazaŭ li kalkulus la poentojn, kaj ŝajnis sobre pensi : Ni fosu nian sulkon !

Kelkajn monatojn poste, biciklante sur strato en la urba centro, la bela estonino estis trafita de stulta trafik-akcidento, kaj mortis. Ŝi, tiel juna, tiel arde viva ! Neimageble...

Jarojn poste ŝia vidvo reedziĝis, kaj mi ne plu aŭdis pri li.

Nekredebla, ankaŭ, la morto, antaŭ nelonge eksciita, de S-ino Albault, edzino de la doktoro prezidanto de la neŭtrala Tuluza grupo kaj eminentulo en Esperantio. Mi vidis ŝin iam en Zamenhof-tago. Malgranda, maldika, sed plena je energio kaj impeto, ŝi, kune kun la edzo kaj infanoj, verve animis la tutan posttagmezon, kaj lumigis per juneca gajo tiun funebran vintran tagon.

Bela esperantista familio. Kaj nun*...

5. En la Paskotagoj 1979 mi ĉeestis la SAT-amikaran kongreson en Avinjono, kies vigla etoso tre plaĉis al mi. La kongreso, en lokaloj de duagrada lernejo, estis bonege organizita. Ĉiuj taskoj de la OKK dividitaj inter pluraj kompetentaj gekamaradoj ĉirkaŭ gek-doĵ Gente, estis kontentige prizorgataj, kaj ĉio glate funkciis. Kontraŭe al mia aserto ĉi-supre (ĉ.IX,4), Avinjono estas

* Post ŝia morto Albault ŝajne malaperis el la movado. Sed nun li reaktiviĝis. Aktivas ankaŭ en neŭtralaj rondoj lia fratino Odette kaj lia filino Raphaëlle.

ekzemplo de vivanta LEA-grupo en mezgranda urbo. Cetere, ekzistas aliaj.

Tie mi retrovis parizajn konatojn : Glodino, Grandière (Rolando kaj Lilio), Schneider, la kompetenta senlaca prizorganto de la Libro-Servo... Mi bedaŭris la ne-ĉeeston de Bannier kaj Barthelmess, kaj de Barkoviĉ, kiun mi esperis tie ekkoni alie ol nur koresponde ; de gemikoj Piron ; el provinco, de ge-Dazun, kaj, ankoraŭ pli bedaŭrinde, ĉar kaŭze de malsano, de gek-doĵ Castelló.

El departemento Gard ni estis ses, ja najbaroj. El aliaj konatoj ĉeestis ankaŭ Lentaigne (Montpeljero) kun sia afabla edzino, Petro Louis (Nancio), Leo Robert (Cenon), Levreaud (Bordoza regiono), kiun mi ne tuj rekonis : mi memoris lin tute razita, kaj li lasis kreski lantian barbegon, kiu kaŝas lian tutan vizaĝon krom la okuloj, ĉiam ridaj kaj sparke brilaj. Tre viveca estis lia raporto, ilustrita per lumbildoj, pri bicikla karavanvojaĝo tra Belgio, Nederlando, Germanio, Polio, Hungario, Rumanio, Aŭstrio... Bedaŭrinde ili ne povis trapasi la limon de Sovetio, ĉefa celo de la vojaĝo (pro malfacilaĵoj pri la pasporta vizo ĉe la sovet-ambasada burokrataro en Parizo). Male, en pluraj orient-eŭropaj landoj esperanto multe faciligis la aferon. Mi notis signifoplenan anekdoton. Iam li baraktis ĉe iu pola ŝtatoficisto, kaj - malgraŭ la ofta poligloteco de tiaj slavoj - ne sukcesis atingi interkomprenon pere de franca, angla, germana, rusa, hispana lingvoj. Fine la polo, incitite, grumblis en siaj dentoj (kaj en esperanto) : "Kaj kompreneble, neniu el vi parolas esperanton !" Ĝenerala rideksplodo : ja ĉiuj estis esperantistoj ! Ekde tiu momento, ĉio estis glatigita.

Inter la Tuluzanoj mi jam konis k-don Guillemau, kaj mi konatiĝis kun Pontnau. El Aikso-la-Provenca venis k-do Michel Duc Goninaz, la profesoro, kiu instruas esperanton al studen-

toj kiel prof. Janton en Klermonto, kaj k-do Jullien, aùtenta provenclingvano. Ambaù jam korespondis kun mi, ĉar ili bonvolis kontroli la fidelecon kaj la lingvan korektecon de mia traduko el la provenca originalo de "La Poemo de Rodano", sed tio estis nia unua interrenkonto.

Ankaù unuafoje mi renkontis, inter aliaj, k-don H. Masson, kiu publikigas en francaj gazetoj tiel bonegajn propagandajn artikolojn ; Jaklinon Lépeix el Strasburgo, tiel simpatian knabinon, kaj nian karan Kribon, kiu venis kun la ĉarmaj edzino kaj fileto. Li prezentis sur tablo siajn broŝurojn : modesta ekspozicio, kompare kun tiu de la belaj libroj de Schneider etenditaj sur longaj tabloj. Ambaù interesis multajn kongresanojn, kaj la disvendado de libroj kaj broŝuroj ŝajnis kontentiga.

Inter la 153 kongresanoj estis reprezentantoj de Belgio kaj Svisio, kaj pluraj gastoj el ekster la franclingviaj teritorioj : SAT-anoj el Aùstrio, Britio, Germanio, Hispanio, Italio, Nederlando.

X. Per Esperanto al Amikeco.

Atinginte la nunan periodon mi volas, antaŭ ol konkludi per kvazaŭa epilogo, pritrakti tiun ĉi temon. Inter la multaj nomoj vice venintaj sub mian plumon, estas kelkaj de personoj, kiujn mi nomas ne nur samideanoj aŭ kamaradoj, sed amikoj. Mi deziras ilustru per unu konkreta ekzemplo la naskigon de amikeco pere de esperanto.

Iam en Paŭo ni ricevis leteron de Stokholmo. "Ni trovis vian adreson en la jarlibro de SAT. Nia filo estas entombigita en Saint-Cricq-du-Gave, proksime de via urbo. Li estis arkitekto en Maroko, kiam li edziĝis kun la filino de grandbiena proprietulo. Tiu ĉi likvidis sian bienon kaj iris en Francion, kie li aĉetis alian. Sekvinte la bofamilion, nia filo malsaniĝis kaj mortis tie. Ni deziras iri al lia tombo, kaj ekkoni lian edzinon kaj lian bebon, kiun li mem ne konis.

"Ni scias, ke tiu familio loĝas en kastelo, sed ni ne volas ĝeni ilin : ni nur petas, ke ili bonvolu rezervi por ni ĉambrojn en proksima hotelo. Ni malfacile nin interkomprenas, ĉar ili estas franclingvaj belgoj, kies lingvon ni ne scias, kaj reciproke. En la korespondado kun helpo de pli-malpli kapablaj tradukistoj ofte okazas miskomprenoj. Ĉu vi bonvolus iri tien, kaj buŝe klarigi nian deziron?"

La postan sabaton ni veturis al Saint-Cricq. Facile trovis la kastelon. Sonorigis ĉe la pordo. Servistino kun blanka antaŭtuko sur nigra robo malfermis, kaj anoncis nin. Ni estis vere ĉe kastelanoj.

Akcepto formale ĝentila, sed glacia, de la sinjorino. Je distanco de kelkaj metroj, en la vasta salono, staris la sinjoro kun alia

viro, eble vokto aŭ intendanto. Li ne moviĝis, kaj daŭrigis sian paroladon. Mi malfermis la leteron kaj laŭte tradukis ĝin. Neniu komento, nur unu vorto : Konsentite. La sinjorino petis nin sidiĝi, ordonis al la servistino alporti al ni kafon kaj voki ŝian filinon.

Tiu ĉi venis kun kelkmonata bebo sur brako. Bela, tre juna virino kun trista vizaĝo. Multe pli simpatia ol la gepatroj. Alta, blonda, svelta, iom delikat-aspekta ; tamen ŝi estis tiu sama, kiun ĉe nia alveno ni ekvidis sur traktoro de ŝi mem stirata, revene de la kampoj.

Ŝi kondukis nin al la tombejo, kien ni portis freŝajn florojn komisie de la svedaj gepatroj. Pri la mortinta edzo, antaŭ la tombo, ŝi nur diris, kun kortuŝa voĉo : "Li estis bona". Ŝi ne ploris, sed ŝia vizaĝo esprimis ankoraŭ pli profundan tristecon. Revenante ŝi haltis ĉe hotelo kaj mendis la ĉambrojn por la difinita tago.

En tiu tago alvenis la sveda paro kun siaj du aliaj gefiloj : la fortika Thor Björn, alta vikingo kiel la patro, kaj la gracia Sunvoj, pli malgranda, kiel la patrino. Ili veturis al Saint-Cricq, sed tie restis ne longe, kaj revenis al ni en Paŭo. La patro, Malte Gahlin, estis bakisto ĉe kooperativa panfabriko, lia edzino Siri tramvoja oficistino. Ambaŭ kun senartifika vizaĝo kaj milda esprimo. Ni facile komprenis, ke tiuj laboristaj SAT-anoj ne simpatias kun la riĉaj kastelanoj, kies filino tamen kun sia adorinda ideto, plaĉis al ili kiel al ni.

Ili portis al ni kiel dankespriman memorajon belan vazon el kristalo fabrikitan en Svedio. Ili restis kelkajn tagojn en la urbo, kie mia edzino ĉiĉeronis al ili. En la naskiĝdomo de generalo Bernadotte, fondinto de la nuna reĝa dinastio en Svedio, ŝi laŭte

tradukis por ili la klarigojn de la gardisto. Tiu admire diris : "Kiel flue vi parolas svede !". Ŝi senerarigis lin, eksplikante, kio estas esperanto.

La sekvantan dimanĉon ni kune veturis al Biarritz, Saint-Jean-de-Luz, kie ni vizitis S-anon Pelletier, kaj nin banis en la maro, kaj laŭiris la marbordon ĝis Hendaye, urbeto ĉe la hispania limo.

Kiam ili reveturis al Svedio, ni estis jam vere amikiĝintaj. De tiam ni interkorespondas. Ili invitis nin al Stokholmo - bedaŭrinde pro diversaj motivoj ni ne povis tien iri ; sed dufoje, en somero, ili venis al ni en Florako, "la bela, la idilia Florako", kiel skribis Malte.

Ni akompanis ilin en ekskursoj tra la Cevena montaro, kaj tiu lando, malsimila al ilia, multe plaĉis al ili. Ni kondukis ilin al la densa, vasta areo de gigantaj bambuoj unika en Eŭropo, en Prafrance apud Anduzo. Tie estas gardisto-ĉiĉerono, kies klarigojn mi laŭte tradukis. Li scivole demandis : "Kiun lingvon vi parolas ?". Mi diris pri la lingvo internacia, kaj aldonis, ke dank'al esperanto ni amikiĝis kun tiu sveda familio : ni ja spertis, kiel nia simpla interkomprenilo povas fariĝi cemento de daŭra amikeco.

Ĉu iam ni revidos niajn svedajn geamikojn ? Ni daŭre interŝanĝas kartojn kaj leterojn. Per fotoj ili iom konigis al ni sian vivokadron. Kaj ni konservas kun aparte alta ŝato kelkajn belajn kolorfotojn de ili faritajn, kiuj montras nin kune starantajn aŭ sidantajn, kune babilantajn inter la someraj floroj de nia ĝardeno en Florako.

XI. Kaj nun ?

1. Hodiaŭ, 19an de februaro 1980, mi celebras mian 80-jaran naskiĝdaton. Sep jardekoj pasis, de kiam juna knabo kun mallonga pantaloneto unuafoje aŭdis la nomon "esperantolingvo internacia", kiu tiel logis lin.

Antaŭ 15 jaroj mi emeritiĝis kiel profesoro, kaj mi sentas min maljuniĝanta. Ĉu nun mi emeritiĝu ankaŭ kiel esperantisto ? Ja verda tempo por serene atendi la morton. El la samideanoj kaj kamaradoj, kiujn mi konis, kion, samaĝaj aŭ pli junaj, jam forpasis ?

Tamen ankoraŭ pluvivas kelkaj samaĝaj aŭ eĉ pli maljunaj : Bourdelon, Dubois, Bannier, Barthelmess, aŭ apenaŭ pli junaj : Waringhien, Nels, Piron, aŭ iom pli junaj kiel ge-Dazun, ke.

Ĉu tiuj ripozas ? Vidu ekzemple Bannier, Barthelmess, Waringhien. Lastjare Schönrich (92-jara !) al kiu mi skribis, retrovinte lian adreson en la listo de la Veterana klubo publikigita de la Internacia Muzeo en Vieno, skribis en sia respondo : "Nia Visbadena grupo anoncis malfermon de kurso por venonta aŭtuno. Se lernontoj enskribiĝos, mi volonte instruos ilin." Jen estis homo ! Jen estas ekzemplo !*

Al tia modelo mi ne povas kompari min. Multaj faris pli, estis pli agemaj kaj efikaj : ne ĉiuj estas samkapablaj ; sed mi penadis agi laŭ mia eblo.

Superflugante per rememora rigardo tiun 70-jaran periodon de mia vivo, mi devas konstati, ke multaj semoj donis avaran rikolton. Plej amare : mi ne sukcesis esti profeto en mia familio. Eĉ ne en mia propra domo. Se

* Kurt Schönrich mortis en majo 1979.

mia edzino, (kiu tamen povoscias iel uzi la lingvon), estus tiel ĝisoste fervora kiel mi, certe niaj gefiloj kaj genepoj estus denaskaj esperantistoj...

Ĉu konfesi ? Tiu mia verketo "...el la kara infaneco" ne estis koncipita sen preciza intenco. Iam mia filo diris : "Tiu rakontoj, kiujn ci faras al ni pri tiaj geavoj, pri la praonklo ĉapelisto, pri Klaŭdius, ktp, ci devus ilin skribi." La ideo ĝermis en mi : eble tio vekus ilian scivolemon ? Tial, antaŭ kvin jaroj, mi surpaperigis tiujn infanecajn rememorojn, destinitajn, en mia penso, precize al miaj genepoj. Al ili mi rezervis tri ekzemplerojn, sur kies unua paĝo mi skribis : Por Franciska, Por Alano, Por Filipo. La broŝuroj restas en ŝranko, virge fermitaj, kune kun tri "Cours Rationnel" kaj tri "Kvina Evangelio".

Ho ! la scivolemo estis ja vekita ! La tuta geidaro demandis : "Ĉu ci verkis tion senpere en esperanto ? - Jes, ĝi estas originalo. - Sed ci povas facile traduki ĝin en francan lingvon ? - Ne, tion mi ne faros. Cetere, en traduko ĝi perdus iom el sia spico. Nu, kiu deziras ĝui ĝin, tiu lernu esperanton !" Ili insistis, mi ne volis cedi. Vi divenas la sekvon. Oni povas rezisti al sia patro, al sia bopatrino, al sia edzino, al sia amantino ; oni povas rezisti al la reĝo, al la papo, al la diablo... Kiu kapablas rezisti al deziro de genepoj ? Mi invokas ateston de ĉiuj maljunuloj, kiuj kulturis la avecan arton*. Do, fine, mi malglorinde kapitulacis. Komprenoble, tiu traduko, kiu ilin ravas, estas neniam presota. Ĝi ja ne aldonus unu plian juvelon al la franca literatura trezoro, - same kiel la originalo nemulte riĉigis la esperantan !

* Viktoro Hugo : "La Arto esti Avo".

2. Se en estonteco junaj esperantistoj legos tiujn ĉi rememorojn, ili eble miros, ke mi okupis tiom da postenoj kaj estis ŝarĝita per tiom da taskoj (pli-malpli bone plenumitaj) en la movado tiel neŭtrala kiel laborista. Ili sciu, ke en la esperantistaro estas multe da plenumendaj taskoj kaj malmulte da homoj, kaj pli malmulte da volontuloj. La postenoj estas donataj ne laŭ la talento, kapablo aŭ merito, sed laŭ la disponebleco : Se iu pretas labori, eĉ super sia nivelo, ne mankas al li laboro, sed nur, tro ofte, la tempo por ĝin fini.

3. Kara pacienca leganto, trankviliĝu : jen alvenas la fino de mia babilado.

Miaaĝaj homoj volonte donas nepetitajn konsilojn al gejunuloj, kiuj aŭskultas ilin kun indulga rideto, kaj plejofte ilin malatentas. Mi ne preterlasos tiun riton, kaj mi konkludos, kvazaŭ testamente, per jena konsilo.

Junaj gesamideanoj, estu ĉiam pretaj por servo al nia idealo. Ne pretekstu tempomankon, aŭ nesufiĉan kapablecon, aŭ kion pli ? Dediĉu al ĝi sindonemon kaj energion, ne domaĝu vian penon, por ke, dank'al vi, plu vivu esperanto !

Florako - Nimo 1979-1980.

GLOSARO

1. Neologismoj ne troveblaj en PV kun suplemento, troveblaj en PIV.

| | | |
|-------------|-----------|-----------|
| apreci | intermezo | pneŭo |
| asidua | invoki | puĉo |
| elvokiva | kabei | saŭdado* |
| faŭvismo | kompano | siglo |
| fokstroto | kompartio | sinistra |
| fola | krakodili | sparta |
| friska | kubismo | superba |
| gaŭlisto | lido | trakcio |
| hitlera | lokalo | trockisto |
| humureska | melomano | versio |
| ikonoklasto | okcitano | vikingo |

* saŭdado. PIV limigas la aplikon de tiu vorto al ĝia specife portugala senco. Mi opinias, kiel Grosjean-Maupin kaj Paul Lobut, ke ĝi havas plenan ekzistorajton en nia internacia lingvo : la homa koro estas sufiĉe universale sama, por ke ĝi tutmonde aplikiĝu, kvankam ĝi havas ekzaktan ekvivalenton en neniu alia nacia lingvo. En la enkonduko (franclingva) al la unua eldono de sia "Dictionnaire complet esperanto-français" (1910) Grosjean-Maupin difinis ĝin "la amara plezuro, kiun oni trovas en sufero kaj malĝojo, la dolora dolĉeco de rememoroj kaj bedaŭroj". Eble, inter la popoloj, la portugala havas plej grandan emon al tiu speciala formo de melankolio, tial ĝia lingvo kreis tiun vorton. Ĝi tamen estas sentebla de ĉiu homo en la mondo, tial nia interpopola lingvo nepre bezonis ĝin adopti. Tial Zamenhof "eksplicite permesis al R. Leite enkonduki en lia vortaro esperanto-portugala la neologismon 'saŭdado' " (Grosjean-Maupin, loc. cit.)

2. Uzataj en alia senco ol en PV :

ĝenro (PIV. 1)
kampanjo (PIV. 1)
panelo (PIV. 4)

3. Netroveblaj en PIV kaj ne klarigitaj en la teksto aŭ piednotoj :

burgo : mezepoka kastelo, precipe ĉe Rejno.

gemuta, germ. gemütlich*.

magjaro : hungaro.

Ŝvarca : Schwartz'a (de Raymond Schwartz)

* gemuta, kiel "saŭdado", estis sensukcese proponita de Grosjean-Maupin en la unua eldono de lia Dictionnaire complet esperanto-français. Li difinis ĝin : "kompleksa mikso de agrablaj sentoj venantaj de materia komforto kaj de vivaj oportunoj, kun emocioj dolĉaj, kvietaj kaj amemaj, kun la morala bonstato sentata en medio simpla, senafekta kaj koreca" (traduko de Paul Lobut el la franclingva enkonduko al la citita vortaro). La Parnasa Gvidlibro difinas ĝin : "estiganta agrablan senton de hejmecc, senĝen-ecc, kamaradeco". Kaj R. Schwartz, en sia romano "Kiel akvo de l'rivero" difinis gemutecon : "etoso en intima rondo, kie miksiĝas natura kamaradeco, bonhumoro kaj komforto".

Gemuta estas domo, apartamento aŭ ĉambro, en kiu regas intimeca etoso, en kiu oni sin sentas komforte tiel anime kiel korpe. Klinika ĉambro povas esti higiena kaj komforta, povas eĉ esti agrabla, ĝi ne estas gemuta.

Pri "gemuta" kiel pri "saŭdado" kaj kelkaj aliaj "netradukeblaj" vortoj, estus citinda la tuta artikolo de la karmemora Paul Lobut : "Ĉu Esperanto fortenu naciajn apartaĵojn ?" (Germana Esperanto-Revuo n^o4 - 18a jark. --aprilo 1965).

4. Geografiaj nomoj

Tiuj, kiuj estas esperantigitaj, estas transskribitaj konforme al PIV, krom kelkaj esceptoj : Brazilio anstataŭ Brazilo, ks., Nimo anstataŭ Nimeso ; plus (netroveblaj en PIV) :

- Aleso - Alès, sudfrancia urbo.
 Anduzo - Anduze, urbeto apud Aleso.
 Dakso - Dax, urbo en sudokcidenta Francio.
 Draginjano - Draguignan, urbo en sudorienta Francio.
 Florako - Florac, urbeto en Cevenoj.
 Gapo - Gap, urbo en Franciuj Alpoj.
 Gefle - Gävle, urbo en Svedio.
 Klermonto - Clermont-Ferrand, urbo en Centramontara Francio.
 Nancio - Nancy, urbo en Loreno.
 Narbono - Narbonne, urbo en Sudfrancio.
 Tarbo - Tarbes, urbo en Franciuj Pireneoj.
 Visbadeno - Wiesbaden, urbo en Okcidenta Germanio.
 Ĉiuj aliaj estas nacilingve ortografiitaj.

4. Nomoj de historie famaj personoj

- Transskribitaj konforme al PIV :
 Ejnŝtejn, Viktoro Hugo, kc.
 aù en nacilingva ortografio :
 Planck, Villon...

Indekso de personaj nomoj

- AARSE Simon 68
 ADAM Eugène (Vd ankaŭ :
 Lanti) 25
 AGOURTINE Léon 39
 AISBERG Eugeno 39
 ALBAULT André, Odette,
 Raphaëlle 80
 AMOUROUX Jean 2, 79
 APOLLONER Heide 68
 ARCHDEACON Ernest 7, 19, 38
 ASPÈS Marguerite 45, 49
 AVID L.G. 46
 AYMONNIER Camille 7, 19

 BANNIER Lucien 45, 60, 81, 86
 BARKOVIĆ Krešimir 68, 81
 BARONNET Félicien 72
 BARTHELMESS Norbert
 2, 46, 60, 68, 69, 81, 86
 BASTIEN Louis 38, 40
 BAUDÉ Christian (KRIBO),
 Solange 82 (Vd KRIBO)
 BAUDET André 36, 63
 de BEAUFRONT (BOFRONTO)
 7, 10
 BERNARD Roger 2, 51, 69
 BERTÉ Andreo, Marcela 57
 BLEIR Vilmos 35
 BLONDIAUX André 43
 BOBIN Marcel 20, 38
 BOIRAC Emile 7
 BONAVENTURA Anni 29, 30
 BORSBOOM E. 3, 25, 38, 46, 73
 BOUBOU Marcel 48
 BOURDELON Honoré 14, 66, 86
 BOURLET Carlo 7

 BROGIONI Beatrice 75
 BROISE Auguste 65
 BUBO (PAQUIER François) 45
 BUTIN Max 23
 BUTLER Montagu C. 67

 CACHON Hector 45
 CANUTO Giorgio 67
 CARLI 8
 CART Théophile 7, 19, 20, 32, 37, 38
 de CASTELJAU 11, 36
 CASTELLÓ Henri, Denise 69, 81
 CAUBEL André 66, 72
 de CHAVANON 36
 CHAVENON F.A. 54
 CHAVET Gabriel 13, 51
 du CHEYRON 68
 CHILARD Lionel 17, 18
 COLNEY Roger 77
 COMBEBIAS Simonne 67
 COTTON Aimé 20
 COURTINAT Léon 26, 54
 COUTEAUX Jean 39
 COUTURAT Louis 7

 ĀE (CZE Andreo) 5, 42, 43

 DALGON Henri 79
 DARNAULT Marc 69
 DAUPHIN (Nimo) 8, 10
 DAUPHIN (Parizo) 8, 39
 DAZUN Edmond, Lucienne
 (DAZUNINO) 46, 66, 81, 86
 DAZZINI Catina 2, 68
 DEGENKAMP G.J. 67
 DELAIRE Pierre 64
 DELANOUE Georges 40, 42

- DELCAMBRE 20
 DESPEYROUX Charles 46
 DRAGONI-TRUFFO Chiara 65,70
 DRONCHAT Gabriel 40
 DUBOIS René 33,41,53,86
 DUCELLIER-ROUVERET Suzanne 15
 DUC GONINAZ Michel 81
 DUFAU 56,57

 ECHARD Paul 5,33,53,60
 ESCARÉ Jules 59
 ESSELIN Albert 38
 EYQUEM Daniel 29

 FAULHABER F.A.F. 67
 FERRARI 38
 FLEGO Sardjan 61,69
 FRIIS L. 68
 FRUS Roberto 70,77,78

 GAHLIN Malte,Siri 84,85
 GAHLIN Thorbjörn, Sunvoj 84
 GARROTE Enio Hugo 68
 GENDRE Robert ("BOFILO") 58
 GENTE André, Hélène 80
 GÉRARD Robert 65
 GLODEAU Louis (GLODO)
 19,45,69
 GLODEAU Simone (GLODINO)
 55,69,72,81
 GOMÈS Manuel 65
 GRANDIÈRE Roland, Lili 72,80
 GRATTAPAGLIA Giuseppe,
 Ursula 70,77
 GRENKAMP-KORNFELD Salo
 33,39,54
 GROSJEAN-MAUPIN Emile
 7,19,21,32,34,38,39,89,90
 GUADET Lucien 19,38
 GUILLEMAU Etienne 81
 ĞIVOJE Marinko 65,68

 HARTMANN Adolf 51
 HAUBEbine Madeleine 34
 von der HEID Alfred 71
 HEIDE Zora 68
 HODLER Hektor 36,40
 IVON (GUILLÉMEUF Yves) 50

 JAKOB Hans 40
 JANTON Pierre 54,82
 JAVAL Emile 7
 JULLIEN Marcel 82
 JUNG Teo 21

 KARLSSON Leif Gunnar 68
 KARMAZIN Ida 45
 KONISI Gaku 68
 KRESTANOV Ivan 39
 KRIBO (Christian Baudé)
 2,74,82

 LAFON 79
 LAGET Louis kaj E.
 11,12,14,16
 LAGRANGE Georges 61,72
 LANOUX 58,79
 LANTI Eugeno (ADAM) 19,25,
 45,49,50,52,53,57,74,77
 LAPENNA Ivo 58
 LA PILA Luigi 65
 LAURAT Lucien (MASCHL Otto)
 61
 LAUZE Ernest 1,8,14,58
 LE BONDIDIER 61
 LE CORNEC Jeannette 33
 LE CORNEC Ludovic 33,60
 LEPEBvre Raymond 41
 LEIZEROVIC Izrael 35
 LENTAIGNE Léon,Suzanne
 72,79,81
 LEPEIX Jacqueline 2,82
 LE PUIL Jacques 61

- LEVREAUD Roland 72,81
 von der LEY W. 65,67
 LIMOUZIN Ellen-Kate 53
 LLECH Jean 40
 LLECH-WALTER René
 40,58,68,79
 LOBUT Paul 68,89,90
 LONG Christopher
 (KRIS LONG) 68
 LOUBIC Paul 68
 LOUIS Pierre 72,81
 LUYKEN Heinrich 24
 MAGNANI Remo 73
 MAHÉ Jacques 69
 MALFÈRE 45
 MARCHAND 55,63
 MARGA RINETA (SCHWARTZ)
 33, 60
 MASSELLIER A. 33
 MASSON Henri 62, 82
 MELO G. 65
 de MÉNIL Félicien 44
 MÉRAS Léon 42
 MÈRE MARIE-NATALIE 5,62
 MEYER Paul 45
 MICARD Henri 46,65
 MIYAMOTO Masao 68
 MOREAU André 55,64
 NELS Jozef 34,51,53,86
 NIŠIMURA 39
 OCKEY Edward 68
 OZERÉE Albert 45
 PAPILLON 19
 PÂRIS André 42, 46
 PAULET 10
 PELLETIER Jean 65
 PELLETIER Rolph 79,85
 PETIT Pierre 29,46
 PIRON Julien, Lucienne
 41,69,81,86
 PLATIEL Hermann 38
 POIRIER Daniel 65,79
 PONCET Louis 40
 PONTNAU Robert 2,81
 PRAT Jean 64
 PRIVAT Edmond 36,40
 PUECHAGUT Gilbert 76
 QUARONE G. 65
 RAMBOUX Georges 38
 RAVŠELJ Jana 69
 RAYNAUD René 58,79
 RÉMY 41,48
 RIBOT André 63
 RIISBERF Gudrun 68
 RINER (RYNER Han) 73,74
 RIVIÈRE Marie-Antoinette
 56,62,63
 ROBERT Eugène 45
 ROBERT Léo 81
 ROFO (RICHARD François) 74
 ROLLET-DE-LISLE Maurice 7,19
 ROSBACH Johan Hammond 68
 ROUSSEAU Célestin 38
 ROUVERET André 15
 ROUX Germaine 74
 ROYER Cécile 38
 ROYER Huguette 5,71
 ROZANOVSKA I. (ROTSTADT) 34
 SALAN Georges 48,55,78,79
 SAMPSON Cecilia 34
 de SAUSSURE René 7,14
 van SCHEEPEN J. 68
 SCHLEICHER Ib 68
 SCHNEIDER Bernard 81,82
 SCHÖNRICH Kurt 28,44,86
 SCHWARTZ Raymond 4,5,30,32,34,

| | |
|-----------------------------|--------------------------|
| SCHWARTZ Raymond (daùrigo) | THOMSON A.W. (AVOTO) 65 |
| 35,42,50,51,52,53,60,61,66, | TONKIN Humphrey 79 |
| 69,90 | |
| SCHWARTZ Marga (Vd MARGA | VIDAL Gaston 54 |
| RINETA) 34,51,66 | VIERNE Yvette 79 |
| SÉBERT Hippolyte 7 | WARINGHIEN Gaston 46,66, |
| SEKELJ Tibor 65 | 68,69 |
| SOLSONA José 33,61 | WARNIER Georges 39,63 |
| | |
| TEXIER René 69 | ZIEGLER Oskar 71 |
| THIERRY Jean 69 | |

Tiu çi broşuro aperas en la kadro de la broşurservo
de Sennacieca Asocio Tutmonda.

Directeur de publication : Simonet. CPPAP n° 58651.
Imprimeur : C.Baudé. F 47340 Laroque Timbaut